$$\mu_{>}(\underset{\sim}{A},\underset{\sim}{B}) = 0{,}5 \cdot (\mu_{\prec}(\underset{\sim}{B},\underset{\sim}{A}) + \mu_{\succ}(\underset{\sim}{A},\underset{\sim}{B})). \blacksquare \tag{9b}$$

Rimarko 5: El la difino 4 sekvas, ke por ĉiu $\underset{\sim}{A}$, $\underset{\sim}{B}$ $\in F$ validas

$$\mu_{<}(\underset{\sim}{A},\underset{\sim}{B}) \in \langle 0;1 \rangle; \quad \mu_{>}(\underset{\sim}{A},\underset{\sim}{B}) \in \langle 0;1 \rangle \tag{10}$$

$$\mu_{<}(\underset{\sim}{A},\underset{\sim}{B}) = \mu_{>}(\underset{\sim}{B},\underset{\sim}{A}). \blacksquare \tag{11}$$

Ekzemplo 4: El la datoj de ekzemplo 3 ni ricevos helpe de rilatoj (6), (7), (8) sinsekve por unuopaj kazoj $i = 1, 2, 3$ sekvajn valorojn:

$$i = 1: \quad 1; 0; 1$$
$$i = 2: \quad 0; 0; 0$$
$$i = 3: \quad 0; 1; 0.$$

Uzante difinon 4 ni poste ricevos el la rezulto de ekzemplo 3 kaj de tiu-ĉi la sekvajn valorojn por $\mu_{<}(A^i, B^i)$, $i = 1, 2, 3$:

$i = 1: \ \mu_{<}(\underset{\sim}{A}^1, \underset{\sim}{B}^1) = 0{,}5 \,.\, (1 + 1) = 1$

$i = 2: \ \mu_{<}(\underset{\sim}{A}^2, \underset{\sim}{B}^2) = 0{,}5 \,.\, (0 + 0) = 0$

$i = 3: \ \mu_{<}(\underset{\sim}{A}^3, \underset{\sim}{B}^3) = 0{,}5 \,.\, (0 + 0) = 0.$

Konsiderante la rimarkon 5, ni havas ankaŭ

$\mu_{>}(B^1, A^1) = 1, \ \mu_{>}(B^2, A^2) = 0, \ \mu_{>}(B^3, A^3) = 0.$

Ĉio denove konforme al nia intuicio. ■

La sekva ekzemplo 5 klarigas interpretadon de la valoroj de aparteneco de la rilatoj $\underset{\sim}{<}$ kaj $\underset{\sim}{>}$.

Ekzemplo 5: Ni konsideru du triangulajn svagajn nombrojn $\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B} \in F$, difinitajn per funkcioj de fidindeco kun sekvaj parametroj :

$\underset{\sim}{A}: a = 1, b = 2, c = 4$

$\underset{\sim}{B}: a = 0, b = 3, c = 3{,}5.$

Poste ni por la unuopaj funkcioj de fidindeco havas

$\mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 0{,}10$ $\qquad \mu_{\succ 1}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) \cong 0{,}13$

$\mu_{\prec 2}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) \cong 0{,}06$ $\qquad \mu_{\succ 2}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) \cong 0{,}14$

$\mu_{\prec}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) \cong 0{,}04$ $\qquad \mu_{\succ}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) = 0$

$\mu_{<}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) \cong 0{,}5 \cdot (0{,}04 + 0) = 0{,}02 \cong \mu_{>}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A})$

Simile ni tamen ankaŭ ricevas

$\mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) \cong 0{,}14$ $\qquad \mu_{\succ 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 0{,}05$

$\mu_{\prec 2}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 0{,}13$ $\qquad \mu_{\succ 2}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) = 0{,}10$

$\mu_{\prec}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) = 0{,}01$ $\qquad \mu_{\succ}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 0$

$\mu_{<}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) \cong 0{,}5 \,.\, (0{,}01 + 0) \cong 0{,}005 \cong \mu_{>}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}).$

La menciita procedo diveni la rilaton de svagaj nombroj $\underset{\sim}{A}$ kaj $\underset{\sim}{B}$ proponas kompreni la svagan nombron $\underset{\sim}{A}$ kiel malpli granda ol $\underset{\sim}{B}$ kun fidindeco 0,02 kaj pli granda kun fidindeco nur 0,005. ■

Ni rememorigu, ke por la svagaj nombroj $\underset{\sim}{A}^2, \underset{\sim}{B}^2$ el la ekzemplo 3 validas

$$\mu_{<}(\underset{\sim}{A}^2, \underset{\sim}{B}^2) = 0 = \mu_{>}(\underset{\sim}{A}^2, \underset{\sim}{B}^2).$$

Montriĝas utile nomigi la klasojn de ĉiuj svagaj nombroj, kies mezuroj de fidindeco de svagaj rilatoj $\underset{\sim}{<} a \underset{\sim}{>}$ estas samaj kaj egalas al 0 (tiuj klasoj estas evidente klasoj de ekvivalenco). Tion ni religos en la difino 5.

Difino 5 : Ĉiuj du svagaj nombroj $\underset{\sim}{A}$, $\underset{\sim}{B} \in F$ ni nomos svage simetriaj, se por ili validos

$$\mu_{<}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = \mu_{>}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 0, \ \underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B} \in F \qquad (12)$$

kaj svage nesimetriaj, se pro ili la ekvacio (12) ne validos. ■

La sekvaj teoremoj priskribas la interrilaton de antaŭe enkondukitaj svagaj rilatoj. Kelkajn ni pruvos nur por triangulaj svagaj nombroj.

Teoremo 1: Estu $\underset{\sim}{A}$, $\underset{\sim}{B} \in F$ ajnaj svagaj nombroj. Poste, se estas $\mu_{\succ 1}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) = 1$, estas $\mu_{\succ 2}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 0$. Simile, se estas $\mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 1$, estas $\mu_{\prec 2}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) = 0$. Malaj asertoj ne validas. ■

Pruvo: Rekte el la difinoj (3) kaj (4) rezultas la valideco de sekvaj malegalecoj por ajnaj svagaj nombroj $\underset{\sim}{A}$, $\underset{\sim}{B} \in F$

$$0 \le \mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) + \mu_{\prec 2}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) \le 1$$

$$0 \le \mu_{\succ 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) + \mu_{\succ 2}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) \le 1.$$

Se do $\mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 1$, estas $\mu_{\prec 2}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) = 0$ kaj laŭ (5) ankaŭ $\mu_{\prec}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 1$. Simile ni povas pritrakti, uzante la duan malegalecon, ankaŭ la svagan rilaton $\underset{\sim}{\succ}_1$ kaj $\underset{\sim}{\succ}_2$. Nevalideco de la mala aserto rezultas el la antaŭaj malegalecoj aŭ el la ekzemplo 4 por $i = 2$. ■

Teoremo 2: Estu $\underset{\sim}{A}$, $\underset{\sim}{B} \in F$ ajnaj svagaj nombroj. Poste, se estas $\mu_{\succ 1}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) = 1$, estas ankaŭ $\mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 1$. ■

Pruvo: Estu c la ekstrema punkto de la intervalo, pro kiu validas

$0 < P_A(x) < 1$ en (x_2^A, c)

$P_A(x) = 0$ por $x \notin (x_2^A, c)$

(c povas esti eĉ ∞), kie $\underset{\sim}{A} \in F$.

Por ĉiu svaga aro $\underset{\sim}{A}$ ni indikas per la signo $Supp(\underset{\sim}{A})$ la aron

$Supp(\underset{\sim}{A}) = \{ x \in R; \mu_A(x) > 0 \}$.

El la kondiĉo de la teoremo rilatas, ke $Supp(\underset{\sim}{B})$ estas intervalo, tial devas esti $c < +\infty$ kaj validas $Supp(\underset{\sim}{B}) \subset (c, +\infty)$.

Tial $Supp(\underset{\sim}{B}) \cap Supp(\underset{\sim}{A}) = \emptyset$ (aŭ maksimume unupunkta) kaj validas

$$\int_{-\infty}^{x_l^B} \max(\mu_A(x) - L_B(x), 0)dx = \int_{-\infty}^{c} \max(\mu_A(x) - L_B(x), 0)dx =$$

$$= \int_{-\infty}^{c} \mu_A(x)dx = \int_{-\infty}^{\infty} \mu_A(x)dx.$$

Tial vere $\mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 1$.

Klaras, ke poste simile el $\mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) = 1$ rezultas ankaŭ $\mu_{\succ 1}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) = 1$. ■

La validon de akra transitiveco inter svagaj nombroj koncerne de la svaga rilato $\underset{\sim}{\prec}_1$ klarigas la sekva teoremo.

Teoremo 3: Estu $\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C}$ svagaj nombroj de la aro F. Se estas $\mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 1$ kaj $\mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C}) = 1$, tiam ankaŭ $\mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{C}) = 1$. ■

Pruvo: el la premiso de la teoremo rezultas
$Supp(\underset{\sim}{A}) \cap Supp(\underset{\sim}{B}) = \emptyset$ (aŭ maksimume unupunkta)

$\forall x \in Supp(\underset{\sim}{A})\ \forall y \in Supp(\underset{\sim}{B})\ ; x \le y$

$Supp(\underset{\sim}{B}) \cap Supp(\underset{\sim}{C}) = \emptyset$ (aŭ maksimume unupunkta)

$\forall y \in Supp(\underset{\sim}{B})\ \forall z \in Supp(\underset{\sim}{C})\ ; y \le z$

Tial
$\forall x \in Supp(\underset{\sim}{A})\ \forall z \in Supp(\underset{\sim}{C})\ ; x \le z$

$Supp(\underset{\sim}{A}) \cap Supp(\underset{\sim}{C}) = \emptyset$ (aŭ maksimume unupunkta)

kaj sekve $\mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{C}) = 1$. ■

Rimarko 7: Evidente validas simila aserto ankaŭ por svaga rilato $\prec_2$:
Se estas $\mu_{\prec 2}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 1$ kaj $\mu_{\prec 2}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C}) = 1$, tiam ankaŭ $\mu_{\prec 2}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{C}) = 1$. ■

Sekva teoremo konstatas akran transitivecon de la rilato $\underset{\sim}{\prec}$ sur F.

Teoremo 4:Estu $\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C}$ svagaj nombroj de la aro F.

Poste el $\mu_{\prec}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 1$ kaj $\mu_{\prec}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C}) = 1$ rezultas $\mu_{\prec}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{C}) = 1$. ■

Pruvo: Por $\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C} \in F$ validu rekte el la difino (5)

$\mu_{\prec}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 1 \Rightarrow \mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 1$

$\mu_{\prec}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C}) = 1 \Rightarrow \mu_{\prec_1}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C}) = 1.$

El la teoremo 3 poste ankaŭ rezultas $\mu_{\prec_1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{C}) = 1$. Rekte el la difino de la svaga rilato $\underset{\sim}{\prec}$ kaj la teoremo 1 poste el la lasta egaleco por la svaga rilato $\underset{\sim}{\prec}_1$ ni ricevas $\mu_{\prec}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{C}) = 1$. ■

Rimarko 8: Similaj asertoj kiel en la teoremo 4 validas ankaŭ por la svaga rilato $\underset{\sim}{\succ}$: Se estas $\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C} \in F$, tiam el $\mu_{\succ}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 1$ kaj $\mu_{\succ}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C}) = 1$ rezultas $\mu_{\succ}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{C}) = 1$.
■

Nun ni montras, ke ankaŭ por la svaga rilato $\underset{\sim}{<}$ inter svagaj nombroj el F validas la klasika transitiveco.

Teoremo 5: Estu $\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C}$ ajnaj svagaj nombroj de la aro F. Se estas $\mu_{<}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 1$ kaj $\mu_{<}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C}) = 1$, estas $\mu_{<}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{C}) = 1$. ■

Pruvo: Estu $\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C} \in F$. Poste

$\mu_{<}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 1 \Rightarrow \mu_{\succ}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) = 1 \wedge \mu_{\prec}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 1$

$\mu_{<}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C}) = 1 \Rightarrow \mu_{\succ}(\underset{\sim}{C}, \underset{\sim}{B}) = 1 \wedge \mu_{\prec}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C}) = 1$

kaj uzante la teoremon 4 ni havas $\mu_{\succ}(\underset{\sim}{C}, \underset{\sim}{A}) = 1$ kaj $\mu_{\prec}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{C}) = 1$.

El tio laŭ la difino de svaga rilato $\underset{\sim}{<}$ ni havas $\mu_{<}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{C}) = 1$. ■

El la ekzemplo 5 ni vidis, ke la mezuroj de fidindeco $\mu_{<}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B})$ kaj $\mu_{>}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B})$ donas malsamajn rezultojn. Tio en kelkaj aplikoj kauzas problemon interpreti (se oni ekzemple atendas unusignifan rekomendon). La interpretadon ni faciligos per enkonduko de la totala svaga ordigo (kiel montras sekva difino).

Difino 5: Estu $\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}$ ajnaj svagaj nombroj de la aro F. La totalan svagan ordigon donitan per funkcio de fidindeco $\mu^T_{\underset{\sim}{<}}$ ni determinas el la rilato

$$\mu^T_{\underset{\sim}{<}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = max(\mu_{<}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) - \mu_{>}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}), 0)\ . \quad ■ \qquad (13)$$

Rimarko 9: Se $\mu^T_{\underset{\sim}{<}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) > 0$, estas $\mu^T_{\underset{\sim}{<}}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) = 0$. Por svage simetriaj svagaj nombroj $\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B} \in F$ estas $\mu^T_{\underset{\sim}{<}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 0 = \mu^T_{\underset{\sim}{>}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B})$. ■

Rimarko 10: Simile kiel en la difino 5 ni determinis la totalan svagan rilaton de ordigo $\underset{\sim}{\leq}^{T}$, ni povas determini ankaŭ la totalan svagan rilaton de ordigo $\underset{\sim}{\geq}^{T}$.

Por ajnaj svagaj nombroj $\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B} \in F$ ni elektas

$$\mu^{T}_{\underset{\sim}{>}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = max\,(\mu_{\underset{\sim}{>}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) - \mu_{\underset{\sim}{<}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}), 0). \blacksquare \qquad (14)$$

Teoremo 6: Estu $\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B} \in F$ ajnaj svagaj nombroj. Poste

$$\mu^{T}_{\underset{\sim}{<}}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) = \mu^{T}_{\underset{\sim}{>}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B})\,. \blacksquare \qquad (15)$$

Pruvo: Sinsekve validas $\mu^{T}_{\underset{\sim}{<}}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) = max\,(\mu_{\underset{\sim}{<}}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) - \mu_{\underset{\sim}{>}}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}), 0) = max\,(\mu_{\underset{\sim}{>}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) - \mu_{\underset{\sim}{<}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}), 0) = \mu^{T}_{\underset{\sim}{>}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}).\blacksquare$

Teoremo 7 : Svaga rilato $\underset{\sim}{\leq}$ (resp. $\underset{\sim}{\geq}$) sur F estas antirefleksiva, t. e.

$$\mu_{\underset{\sim}{<}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{A}) = 0 \text{ (resp. } \mu_{\underset{\sim}{>}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{A}) = 0) \qquad (16)$$

por ĉiu $\underset{\sim}{A} \in F$ ■

Pruvo: Por ĉiu $\underset{\sim}{A} \in F$ laŭ (9a), (5) kaj (8) validas

$\mu_{\underset{\sim}{<}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{A}) = 0{,}5 \cdot (\mu_{\succ}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{A}) + \mu_{\prec}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{A})) = 0{,}5 \cdot (max\,(\mu_{\succ 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{A}) - \mu_{\succ 2}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{A}), 0) + max\,(\mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{A}) - \mu_{\prec 2}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{A}), 0) = 0{,}5 \cdot (0 + 0) = 0.$ ■

El la teoremo 7 rekte poste rezultas antirefleksiveco de la svagaj rilatoj $\underset{\sim}{\geq}^{T}$ $\underset{\sim}{\leq}^{T}$:

$\mu^{T}_{\underset{\sim}{>}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{A}) = max\,(\mu_{\underset{\sim}{>}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{A}) - \mu_{\underset{\sim}{<}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{A}), 0) = max\,(0 - 0{,}0) = 0 = \mu^{T}_{\underset{\sim}{<}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{A}).$

Rimarko 11: Svagan rilaton de egaleco $\underset{\sim}{=}$ inter svagaj nombroj sur F eblas difini helpe de ties funkcio de fidindeco en la formo

$$\mu_{\underset{\sim}{=}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = max\,(1 - \mu_{\underset{\sim}{<}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) - \mu_{\underset{\sim}{>}}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}), 0) \qquad (17)$$

por ajnaj $\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B} \in F$. ■

La sekva ekzemplo 6 montras, ke transitiveco de la svaga rilato $\prec_1$ inter la svagaj nombroj $\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C} \in F$, difinita per la kondiĉo

$$min\,(\mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}), \mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C})) \leq \mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{C}) \qquad (18$$

ĝenerale ne validas.

Ekzemplo 6: Ni havu tri triangulajn svagajn nombrojn $\underset{\sim}{A}$, $\underset{\sim}{B}$, $\underset{\sim}{C}$, difinitajn per siaj parametroj a, b, c jene:

$\underset{\sim}{A}: a_1 = 1, b_1 = 2, c_1 = 3$

$\underset{\sim}{B}: a_2 = z, b_2 = 4, c_2 = 5, z \in R$

$\underset{\sim}{C}: a_3 = 0, b_3 = 3, c_3 = 4.$

Poste por $z \in (-1{,}63; -1{,}33)$ ne validas la rilato (15). Ekzemple por $z = -1{,}5$ ni ricevos per kalkulo

$\mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) \cong 0{,}137$

$\mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C}) \cong 0{,}128$

$\mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{C}) \cong 0{,}125$

do estas $min\,(\mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}), \mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C})) = min\,(0{,}137;0{,}128) > 0{,}125 \cong \mu_{\prec 1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{C})$. ■

Rimarko 12: Analogio de la rilato (16) por svagaj rilatoj $\prec_2$, $\succ_1$ kaj $\succ_2$ poste ankaŭ ne validas ĝenerale. ■

Mezuroj de la fidindeco por ĉiuj ĉi tie prikonsiderataj svagaj rilatoj baziĝas sur certaj integraloj de fidindeco de svagaj nombroj. Konsiderante la plej eble grandan konsenton de nia intuicio kaj sperto kun la formuligitaj rilatoj oni devas unue enkondukitajn difinojn de la rilatoj iam iom korekti (aŭ almenaŭ ebligi tian korekton). Kian influon por la mezuro de fidindeco de svagaj rilatoj povas havi tia korekto, ni montros per ekzemplo.

Difino 6: Ni diru, ke ni la svagan nombron $\underset{\sim}{A} \in F$ normigos al svaga aro $\underset{\sim}{A}^n$ kun funkcio de fidindeco μ_{A^n}, kiam $\int_{-\infty}^{\infty} \mu_A(x)dx \neq 0$ kaj ni elektas

$$\mu_{A^n}(x) = \frac{\mu_A(x)}{\int_{-\infty}^{\infty} \mu_A(x)dx}, \qquad x \in R. \; ■ \tag{19}$$

Rimarko 13: Per normigado de la triangula svaga nombro $\underset{\sim}{A}$ ni normigas ties dekstran kaj maldekstran parton; aro $Supp(\underset{\sim}{A})$ per normigado ne ŝanĝiĝas por ajna svaga nombro $\underset{\sim}{A} \in F$

$$Supp(\underset{\sim}{A}^n) = Supp(\underset{\sim}{A}). \; ■ \tag{20}$$

Se ni transigas la esprimojn (3), (4), (6), (7) en niaj difinoj tiel, ke ĉie, kie troviĝas mezuro de fidindeco de iu triangula svaga nombro (aŭ ties restrikcio) estu anstataŭigita per kvociento, en kies numeratoro restas la origina mezuro kaj en la denominatoro estas

la valoro de integralo el tiu mezuro tra R, ni ricevos normigitajn mezurojn en la formo ekz.

$$\mu^{n}_{\prec_1}(\underset{\sim}{A},\underset{\sim}{B}) = \int_{-\infty}^{b_2} \max\left(\frac{\mu_A(x)}{A} - \frac{L_B(x)}{B}, 0\right)dx$$

$$A = \frac{c_1 - a_1}{2}; \quad B = \frac{c_2 - a_2}{2}. \qquad (21)$$

Rimarko 14: En la aro F estas por triangulaj svagaj nombroj ekvivalentaj jenaj duopoj da asertoj:

$\underset{\sim}{B} \geq \underset{\sim}{A}$: $\mu_{\prec_1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) \geq 0 \wedge \mu_{\prec_2}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) = 0 \wedge$

$\wedge\ \mu_{\succ_1}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) \geq 0 \wedge \mu_{\succ_2}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 0$;

$B \leq \underset{\sim}{A}$: $\mu_{\prec_1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 0 \wedge \mu_{\prec_2}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) \geq 0 \wedge$

$\wedge\ \mu_{\succ_1}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{A}) = 0 \wedge \mu_{\succ_2}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) \geq 0$). ■

Neplenumo de la kondiĉo de transitiveco (18) por la svaga rilato $\underset{\sim}{\prec}_1$ (resp. $\underset{\sim}{\succ}_1$, $\underset{\sim}{\prec}_2$, $\underset{\sim}{\succ}_2$) sur la klaso de ĉiuj svagaj nombroj el F konsiderinde malpliigas la aplikadeblojn. Ĉar $\underset{\sim}{\prec}_1$ ne estas svaga rilato de ordigo plenumanta (18), restas ofte nesolvita la problemo, kiel determini la optimuman varianton el la tri eblaj. Estas demandinde, kiom ofte tio povas okazi, se ni uzos triangulajn svagajn nombrojn.

Ekzemplo 7: Se ni normigas triangulajn svagajn nombrojn $\underset{\sim}{A}$, $\underset{\sim}{B}$, $\underset{\sim}{C}$ el la ekzemplo 6, ni ricevos normigitajn mezurojn

$\mu^{n}_{\prec_1}(\underset{\sim}{A}, \underset{\sim}{B}) = 0{,}649$ $\qquad \mu^{n}_{\prec_1}(\underset{\sim}{A}, C) = 0{,}457$ $\qquad \mu^{n}_{\prec_1}(\underset{\sim}{B}, \underset{\sim}{C}) = 0{,}095$.

La indikita ŝanĝo de valoroj de funkcioj de fidindeco kaŭzis, ke por la konsiderataj svagaj nombroj kaj normigita normo validas (16). ■

Estu ajnaj tri triangulaj svagaj nombroj $\underset{\sim}{A}_1$, $\underset{\sim}{A}_2$, $\underset{\sim}{A}_3$ determinataj sinsekve per triopoj da nombroj a_i, b_i, c_i, $a_i \leq b_i \leq c_i$, i = 1, 2, 3. Poste, se por ili validas (konsiderante iliajn intersekcon, resp. konjunkcion)

$$\underset{\sim}{A}_1 \leq \underset{\sim}{A}_2 \leq \underset{\sim}{A}_3, \qquad (22)$$

estas

$$a_1 \leq a_2 \leq a_3; \quad b_1 \leq b_2 \leq b_3; \quad c_1 \leq c_2 \leq c_3 \qquad (23)$$

Sed ankaŭ male validas, se la tri triangulaj svagaj nombroj $\underset{\sim}{A}_1$, $\underset{\sim}{A}_2$, $\underset{\sim}{A}_3$ estas ligataj al kondiĉo (23), por ili validas (22). (Tio estas sekvo de la teoremo 1.10 ĉe Talašová 2003.)

Sed se validas por ajnaj tri triangulaj svagaj nombroj $\underset{\sim}{A}_1$, $\underset{\sim}{A}_2$, $\underset{\sim}{A}_3$ kondiĉo (22), resp. (23), estas plenumita ankaŭ la kondiĉo de la svaga transitiveco por $\prec_1$ ($\prec_2$ kaj $\underset{\sim}{\prec}$) Tio resultas el la fakto, ke sub indikitaj kondiĉoj ĉiam validas

$$\int_{-\infty}^{b2} \max(\mu_{A1}(x) - L_{A2}(x), 0)dx \leq \int_{-\infty}^{b3} \max(\mu_{A1}(x) - L_{A3}(x), 0)dx.$$

Konsiderante la ekzemplon 6 ni vidas, ke la nocio de svaga transitiveco de la indikitaj svagaj rilatoj estas pli larĝa (plenumas ĝin pli vasta klaso de svagaj nombroj). Tio estas favora informo por okazaj aplikadoj de tiu metodo kompari svagajn nombrojn.

Rimarko 15: Se du ajnaj triangulaj svagaj nombroj $\underset{\sim}{A}_1$, $\underset{\sim}{A}_2$ estas determinitaj per triopoj da nombroj a_i, b_i, c_i, $a_i \leq b_i \leq c_i$, kie krome estas $b_i - a_i = c_i - b_i$ $i = 1, 2$, validas ĉiam aŭ $\underset{\sim}{A}_1 \leq \underset{\sim}{A}_2$ aŭ $\underset{\sim}{A}_2 \leq \underset{\sim}{A}_1$. ■

Ekzemplo 8: Oni observis influon de kvin diversaj medikamentoj al kuracado de certa stadio de certa malsano. Sukceso de la kuracado per la disponigita medikamento estis pritaksita en 11-punkta skalo 0, 1, 2....,10. Tiam la valoro 10 devis indiki optimuman sukceson, valoro 0 la plej malaltan nivelon de sukceso. Por ĉiu medikamento oni pritaksis la rezultojn de la esploro tiel, ke el ĉiuj ekspertaj prijuĝoj, formantaj aron S, estis elserĉitaj kaj la minimuma, kaj la maksimuma punkta valoro kaj mediano (eventuale modalo). Al ĉiu medikamento tiel estis aljuĝita sukceso de la kuracado kiel triangula svaga nombro, determinita per triopo $a = min\{S\}$, $b = mediano\{S\}$, $c = max\{S\}$. Estis interkonsentite, ke el la du eblaj medikamentoj P_i, P_j, $i \neq j$, kun sukcesoj $\underset{\sim}{P}_i$, $\underset{\sim}{P}_j$, oni konsideros pli sukcesa la medikamenton P_j, se $\mu^T_{\underset{\sim}{<}}$ $(\underset{\sim}{P}_i, \underset{\sim}{P}_j) > 0$.

Rezultoj de la esploro por la medikamentoj P_1, P_2, ... P_5 estis indikitaj en la tabelon Tab.1. Elkalkulitaj mezuroj de fidindeco de la svaga rilato $\underset{\sim}{<}^T$ troviĝas en la tabelo Tab. 2

medikamento	*a* *min{S}*	*b* *mediano {S}*	*c* *max{S}*
P_1	3	5	8
P_2	4	6	7
P_3	7	8	10
P_4	1	3	6
P_5	5	8	9

Tab.1

$\underset{\sim}{<}^{T}$	$\underset{\sim}{P}_1$	$\underset{\sim}{P}_2$	$\underset{\sim}{P}_3$	$\underset{\sim}{P}_4$	$\underset{\sim}{P}_5$
$\underset{\sim}{P}_1$	0	0,14	0,94	0	0,66
$\underset{\sim}{P}_2$	0	0	1,00	0	0,71
$\underset{\sim}{P}_3$	0	0	0	0	0
$\underset{\sim}{P}_4$	0,64	0,80	1,00	0	0,96
$\underset{\sim}{P}_5$	0	0	0,40	0	0

Tab.2

El la Tab. 2 estis kunmetitaj sekvaj ĉenoj de la sukcesnivelo de pritraktitaj medikamentoj: P_4 P_1 P_2 P_3 kaj poste P_4 P_1 P_2 P_5 kaj P_5 P_3. La plej sukcesa poste montriĝis la medikamento P_3.

Intersekco de la reprezentantaj svagaj aroj ofertas al ni informon pri la rilato $\leq$ de la sukcesa kuracado, indikita en la Tab. 3. Tie ni per la signo „?" registras nekompareblon de niveloj de la sukceso por la medikamentoj P_1 kaj P_2.

$\leq$	$\underset{\sim}{P}_1$	$\underset{\sim}{P}_2$	$\underset{\sim}{P}_3$	$\underset{\sim}{P}_4$	$\underset{\sim}{P}_5$
$\underset{\sim}{P}_1$	+	?	+	–	+
$\underset{\sim}{P}_2$	?	+	+	–	+
$\underset{\sim}{P}_3$	–	–	+	–	–
$\underset{\sim}{P}_4$	+	+	+	+	+
$\underset{\sim}{P}_5$	–	–	+	–	+

Tab. 3

Ellasinte la rezulton por medikamento P_2 (resp. P_1) ni ricevos jam kompletan ordigon en la restanta aro de la svagaj aroj de sukceso : $\underset{\sim}{P}_4$, $\underset{\sim}{P}_1$, ($\underset{\sim}{P}_2$) , $\underset{\sim}{P}_5$, $\underset{\sim}{P}_3$.

Iam estas konvene ordigi la triangulajn svagajn nombrojn helpe de x-aj koordinatoj de pezocentroj de trianguloj, formataj per grafikaĵo de nenulaj valoroj de la fidindec-funkcio de la koncerna svaga nombro $\underset{\sim}{A}$ kaj ties $Supp(\underset{\sim}{A})$. En nia kazo oni tiel akirus la sekvan kompletan ordigon de la svagaj aroj de la kvin rezultaj sukcesoj de medikamentoj (en krampoj estas indikita x-a koordinato de la pezocentro, rondigita al unu decimala loko):

$\underset{\sim}{P}_4$ (3,3) , $\underset{\sim}{P}_1$ (5,3), $\underset{\sim}{P}_2$ (5,7), $\underset{\sim}{P}_5$ (7,3), $\underset{\sim}{P}_3$ (8,3).

Tiu tipo de ordigo ĉiam plenumas la kondiĉon de la transitiveco (kaj estas kompleta). ■

Konkludo

Ni montris, kiel eblas enkonduki asimetrian, akre transitivan kaj komplete ordigitan svagan rilaton sur (triangulaj) svagaj nombroj kun Riemann-e integrita mezuro de

fidindeco. Per kompleteco de la svaga rilato ni komprenis nur tion, ke la difina celaro de ties funkcio de fidindeco estas $F \times F$. Tiu (tiuj) svaga rilato $\underset{\sim}{\leq}^{T}$ ($\underset{\sim}{\preceq}_1$, $\underset{\sim}{\preceq}_2$, $\underset{\sim}{\preceq}$, $\underset{\sim}{\leq}$, $\underset{\sim}{\geq}_1$, $\underset{\sim}{\geq}_2$, $\underset{\sim}{\geq}$) ebligas kompari ajnajn du svagajn nombrojn el la aro F surbaze de fidindeco de la funckio kaj, diference de la ofte uzata kategoria komparo de la svagaj nombroj per la metodo de intersekco kaj konjunkcio, ĝi estas kompleta. Kondiĉon de la svaga transitiveco ĝi tamen ĝenerale neplenumas (neplenumas ĝin tamen ankaŭ aliaj svagaj rilatoj sur certaj aroj de svagaj nombroj, ekzemple la svaga rilato de preferenco (vidu Mareš 1994, Talašová 2003).

Literaturo :

Jang, J. – S. R., Sun, C. – T., Mizutani, E.: Neuro – Fuzzy and Soft Computing. Prentice Hall, NJ 07458, USA 1997

Mareš, M. : Počítání s vágností II. Automatizace 2, 2001, 96-99

Mareš, M. : Computation over Fuzzy Quantities. CRC Press, Boca Raton 1994

Půlpán, Z.: K problematice měření v humanitních vědách. Academia, Praha 2000

Půlpán, Z.:K problematice zpracování empirický šetření v humanitních vědách, Academia, Praha 2004

Talašová, J. : Fuzzy metody vícekriteriálního hodnocení a rozhodování. Univerzita Palackého v Olomouci, Olomouc 2003

Ricevita 2003-12-20

Adreso de la aŭtoro: Prof. RNDr. Zdeněk Půlpán, CSc., katedra matematiky, Univerzita Hradec Králové, V. Nejedlého 573, CZ-500 03 Hradec Králové 3

Arranging of experimental results represented with help of the fuzzy numbers (Summary)

The article explains the method of arranging the fuzzy numbers. The usefulness of explained method is showed on the example of the medical experiment.

grkg / Humankybernetik
Band 45 · Heft 3 (2004)
Akademia Libroservo / IfK

Karakterizo kaj stato de la Sibiua Programo kontraste elvolvi la eŭropiajn lingvojn en modelseriojn.

de Cristina TANC, Sibiu (RO)
el la Lucian Blaga Universitato

1. *Antaŭrimarkigoj*

Zamenhof mem diris, ke en la Internacia Lingvo oni devas obei nur la logikon. Ŝulco (1985, p. 34) konkludas, ke „tio implikas, ke en ĝi oni devas obei la logikon pli ol Zamenhofon", kaj ke „per la apliko de la logiko al la deksesregula gramatiko la lingvo fariĝas scienco".
Sed poste aliaj diris, ke en 1905 en Boulogne-sur-Mer fariĝis netuŝebla konvencio. Ŝulco (1985) donas kiel analogion la kreon de la mezurunuo „metro", kiu ankaŭ estas nura konvencio kaj kiu tamen per la al ĝi aplikenda logiko ebligas la modernajn natursciencojn. Ankaŭ ĉiu alia mezurunuo povintus efektiviĝi per respektiva konvencio. Sed ĉar ĉi tiu mankas, la „metro" rezultas optimuma.
La baza regularo de la Internacia Lingvo (ILo) ne estas kompleta sed ĝi estas kompletigebla. Tio ne signifas, ke oni komplikigu la lingvon, ŝanĝu la bazan strukturon aŭ sankciu erarojn pro tio, ke ili estas tradicioj, eĉ, laŭ Ŝulco, parte faritaj de Zamenhof mem.

La celo de la Sibiua Programo estas, evoluigi la lingvon ene en la limoj, ki-

Kennzeichnung und Stand des Hermannstädter Programms zur kontrastiven Modellreihen-Entwicklung der europischen Sprachen.

von Cristina TANC, Hermannstadt (RO)
aus der Lucian Blaga Universität

1. *Vorbemerkungen*

Zamenhof selbst sagte, man müsse in der Internationalen Sprache ausschließlich der Logik gehorchen. Schulz (1985, S. 34) folgert, dass „man demnach in ihr der Logik mehr gehorchen muss als Zamenhof" und: „Durch Anwendung der Logik auf die sechzehn Regeln umfassende Grammatik wird die Sprache zu einer Wissenschaft."
Später aber erklärten andere, es sei 1905 in Boulogne-sur-Mer eine unantastbare Vereinbarung getroffen worden. Schulz (1985) nennt als Analogie die Schaffung der Maßeinheit „Meter", die auch eine bloße Konvention ist, und die dennoch durch die auf sie anzuwendende Logik die modernen Naturwis-senschaften ermöglicht. Auch jede andere Maßeinheit hätte durch eine entsprechende Konvention wirksam werden können. Da sie aber fehlt, bleibt der „Meter" optimal.
Die Grundregeln der Internacia Lingvo (ILo) sind unvollständig, können aber ergänzt werden. Das bedeutet nicht, man solle die Sprache komplizieren, ihre Grundstruktur verändern oder Fehler übernehmen, weil die Tradition sie heiligen würde oder, nach Schulz, teilweise selbst Zamenhof sie beging.

Das Ziel des Hermannstädter Programms ist, die Sprache innerhalb der Grenzen zu ent-

ujn starigas la baza regularo kaj la logiko, kaj per tio kontribui ankaŭ al la lernigado de aliaj eŭropiaj lingvoj, uzante ILon kiel referenclingvon.

wickeln, welche die Grundregeln und die Logik abstecken, und dadurch zur Lernförderung anderer europischer Sprachen beizutragen, wobei ILo als Referenzsprache benutzt wird.

2. *Ekesto de la Sibiua Programo*

2. *Ursprung des Hermannstädter Programms.*

Rikardo Ŝulco (1985, p. 130) klarigas en siaj „Notoj pri la aksiomado de la Internacia Lingvo“, ke „per aksiomado de la Internacia Lingvo la interlingvistiko atingos firman sciencan bazon.“
En pluraj artikoloj parolas ankaŭ Frank pri la aksiomatiko de interlingvistiko, i.a. en „Zur kybernetischen Rechtfertigung einer axiomatischen Interlinguistik“ (1985) kaj en „Ansatz zu einer interlinguistischen Sprachaxiomatik für Fremdsprachpropädeutik und Eurolinguistik“ (2000).
La artikolo, kiu vere lanĉis la „Sibiuan Programon“ por „la elvolvo en modelseriojn“ de la eŭropiaj lingvoj, havas la titolon:

Richard Schulz (1985) erklärt in seinen „Notizen zur Axiomatisierung der Internacia Lingvo“: „Durch die Axiomatisierung der Internationalen Sprache wird die Interlinguistik zu einer festen Grundlage gelangen.“
In mehreren Artikeln spricht auch Frank von der Axiomatik der Interlinguistik, u.a. in den Arbeiten „Zur kybernetischen Rechtfertigung einer axiomatischen Interlinguistik“ (1985) und „Ansatz zu einer interlinguistischen Sprachaxiomatik für Fremdsprachpropädeutik und Eurolinguistik“ (2000).

Der Beitrag, der den eigentlichen Anstoß zum „Hermannstädter Programm“ der „Modellreihenentwicklung“ der europischen Sprachen gab, trägt den Titel

Zur Modellreihen-Entwicklung der deutschen Sprache und der anderen Sprachen Europiens. Ein axiomatisch-interlinguistischer Beitrag zum Aufbau der Eurologie als künftigem Schulfach.

En ĉi tiu artikolo Frank (2000b) klarigis, en kiu konsistu la „Sibiua Programo“, kaj kiel ĝi ekestis. Oni povas ĝin koncizigi en dek punktojn, kiuj ne estas nepre netuŝeblaj (Tanc, 2002). Ili estis - kiel bazo por la programlaboro - kvazaŭ distilataj el la menciitaj publikaĵoj de Frank (1995, 2000a, b). Redemandoj al la aŭtoro kaj lia kontrolo de la jen unuafoje ankaŭ germanlingve prezentata rezulto helpis eviti misinterpretadon.

In diesem Beitrag erklärt Frank (2000b), worin das „Hermannstädter Programm“ bestehen soll, und wie es entstand. Man kann es zu zehn Punkten zusammenfassen, die nicht unbedingt unanfechtbar sind (Tanc, 2002). Sie wurden - als Grundlage für die Programmarbeit - aus den erwähnten Publikationen von Frank (1995, 2000a,b) quasi destilliert. Rückfragen beim Autor und seine Kontrolle des hier erstmals auch deutschsprachig vorgelegten Ergebnisses halfen Fehlinterpretationen zu vermeiden.

3. *Intencoj kaj celoj de la Sibiua Programo.*

I. Lingvo *manifestiĝas* (kiel „lingvaĵo“, france: *language, parole*) per *frazoj,* t.e. finiaj sinsekvoj de elementoj el finia, lingvospecifa repertuaro de „signifantoj“ (germane: *Zeichen für* ... aŭ *Bezeichnungen*) nomitaj *leksemoj,* kiuj estas *kaj* paroleblaj *kaj* skribeblaj, kaj en ambaŭ ĉi aperformoj samsignifaj.

II. Lingvo *estas* (kiel „lingvokodo“, france: *langue*) funkcio (en la matematika senco), kiu alordigas al eblaj asertoj aŭ postuloj de sendanto (t.e. parolanto aŭ skribanto) kiel siajn funkcivalorojn frazojn, tiel, ke la aro de alordigeblaj frazoj ne enhavas ĉiujn eblajn sinsekvojn de leksemoj (sed nur ĉiujn „sintakse korektajn“ sinsekvojn). La inversa funkcio alordigas kiel sian signifon „fakton“ al ĉiu ebla, sintakse korekta frazo, nome aserton aŭ postulon de la sendinto.

III. Lingvo-kodo nek devas esti inversigeble unusenca funkcio (sed povas ekzisti sinonimoj, kiuj kodas diverse saman signifon) nek unusence malkodebla (povas ekzisti homonimoj).

IV. Planlingvo (do: konscie evoluigita lingvo) estas lingvokodo difinita per (a) leksemaro (alordiganta al ĉiu leksemo sian signifon aŭ siajn signifojn) kaj (b) gramatika regularo, t. e. preskribo por la alordigado de sintakse korekta frazo aŭ de sinonimaj frazoj al ebla aserto aŭ postulo. (La planlingvo tiusence antaŭiras sian konscian aplikon per kreado de lingvaĵaj – tekstaj – manifestaĵoj.) Tiu difino estas konsiderebla kiel aksioma sistemo, de kiu la

3. *Absichten und Ziele des Hermannstädter Programms.*

I. Sprache *manifestiert sich* (als „Gewortetes“, französisch *language, parole*) in *Sätzen,* d.h. endlichen Folgen von Elementen aus einem endlichen, sprachspezifischen Vorrat von „Bezeichnungen“ (oder *Zeichen für* ...), die *Lexeme* genannt werden, und die sowohl gesprochen als auch geschrieben werden können und in beiden Formen gleichbedeutend sind.

II. Eine Sprache *ist* (als „Sprachcode“, französisch: *langue*) eine Funktion (im mathematischen Wortsinn), die möglichen Behauptungen oder Forderungen eines Senders (d.h. des Sprechers oder Schreibers) als ihre Funktionswerte Sätze so zuordnet, dass die Menge der zuordnenbaren Sätze nicht alle möglichen Lexemfolgen enthält (sondern nur alle „syntaktisch richtigen“ Folgen). Die Umkehrfunktion ordnet allen möglichen, syntaktisch richtigen Sätzen als ihre jeweilige Bedeutung „Fakten“ zu, nämlich Behauptungen oder Forderungen des Senders.

III. Ein Sprachkode muss weder eine umkehrbar eindeutige Funktion sein (es kann vielmehr Synonyme geben, welche dieselbe Bedeutung verschieden codieren) noch eindeutig entschlüsselbar (es können Homonyme existieren).

IV. Eine Plansprache (also eine bewusst entwickelte Sprache) ist ein *Sprachcode,* definiert durch (a) einen Lexemvorrat (der jedem Lexem seine Bedeutung oder seine Bedeutungen zuordnet) und (b) ein grammatisches Regelwerk, d.h. eine Vorschrift für die Zuordnung eines syntaktisch richtigen Satzes oder synonymer Sätze zu einer möglichen Behauptung oder Forderung. (Die Plansprache geht in diesem Sinne ihrer bewussten Anwendung zur Erzeugung von Wortungen – Texten – voraus, in denen sie manifest wird.) Diese Definition einer

leksemaro konsistas el la signadaksiomoj (germane: *Bezeichnungsaxiome*), la gramatiko el la strukturaksiomoj. Lingvaĵo, kiu ne konformas al la aksiomoj, estas erara.

V. La Internacia Lingvo (ILo) de Doktoro Esperanto estas planlingvo, „kiun iniciatis L.L. Zamenhof (sub la pseŭdonimo ‚Doktoro Esperanto') en 1887 kaj kiu baziĝas laŭ la deklaracio de Boulogne-sur-Mer (1905) sur la t.n. ‚Fundamento'. Tiu ĉi difinas per la ‚Kvinlingva Gramatiko' kaj la ‚Universala Vortaro' la lingvan kodon. Pluevoluigo de la lingvo devas esti logike konforma al la tiel difinita kodo kaj respektu la komunikajn bezonojn de la scienco" (Apendico al la Statuto de AIS, art. 4.1, citita laŭ Fössmeier kaj Frank, 2000, p. 202). La 16 reguloj de la „Kvinlingva Gramatiko" (vd. la Fundamenton de Zamenhof, 1905) estas skizo de sistemo de aksiomoj, kiun eblas eksplicite detaligi kaj (kie Zamenhof ellasis senaverte preskribojn memkompreneblajn por parolantoj de eŭro-piaj lingvoj) kompletigi per „partaj aksiomoj" (germane: „Teilaxiome").

VI. Nacia lingvo (alivorte: etna aŭ historie evoluinta lingvo aŭ kulturlingvo) estas supozita lingvokodo, kiun ĝia portantaro (nacio) senkonscie aplikas produktante la manifestiĝojn (speziale tekstojn).

La lingvisto supozas leksemajn signifojn kaj gramatikajn regulojn regantajn la ekzistantan, observatan lingvaĵon. (Analoge la fizikisto supozas naturleĝojn regantajn la ekzistantajn, observatajn naturfenomenojn.)

La supozoj poste konstituas teorion, per kiu oni celas ekspliki tion, kion oni

Sprache ist als *ihr Axiomensystem* zu betrachten, von dem der Lexemvorrat die Bezeichnungsaxiome konstituiert, die Grammatik die Strukturaxiome. Eine Wortung, welche den Axiomen nicht genügt, ist fehlerhaft.

V. Die Internacia Lingvo (ILo) de Doktoro Esperanto ist eine Plansprache, „welche L.L.Zamenhof (unter dem Pseudonym „Doktoro Esperanto") 1887 initiierte, und die nach der Erklärung von Boulogne-sur-Mer (1905) auf dem sog. ‚Fundamento' aufzubauen ist. Dieses definiert durch die ‚Fünfsprachige Grammatik' und das ‚Universelle Wörterbuch' den Sprachcode. Eine Weiterentwicklung der Sprache muss mit dem so definierten Code logisch vereinbar sein und soll die Kommunikationsbedürfnisse der Wissenschaft berücksichtigen." (Anhang zur Satzung der AIS, Art. 4.1, vgl. Fössmeier und Frank, 2000, S. 202.)

Die 16 Regeln der „Fünfsprachigen Grammatik" (vgl. Fundamento von Zamenhof, 1905) ist eine Skizze eines Axiomensystems, das ausdrücklich aufgegliedert und durch Teilaxiome ergänzt werden kann (wo Zamenhof stillschweigend Vorschriften ausließ, die für Sprecher europischer Sprachen selbstverständlich sind).

VI. Eine Nationalsprache (mit anderen Worten: *ethnische* oder *geschichtlich gewachsene* oder *Kultursprache*) ist ein *unterstellter* Sprachcode, den ihre Trägerschaft (Nation) unbewusst bei der Erzeung der Manifestationen (Wortungen, speziell Texte) anwendet. Der Linguist unterstellt lexemische Bedeutungen und grammatische Regeln, welche die verwirklichten, beobachteten Wortungen beherrschen. (Analog dazu unterstellt der Physiker Naturgesetze, denen die wirklichen, beobachteten Naturerscheinungen unterworfen sind.) Die Unterstellungen konstituieren eine Theorie, durch welche man das

povas tute empirie observi.
La ekzisto de la manifestiĝo antaŭiras la esencon teorie supozitan. Teoria aserto, kiu ne konformas al manifestiĝinta lingvaĵo, estas erara.

Aldonaj manifestiĝoj tial povas necesigi pliperfektigon de la teorio.

VII. Lingvistika teorio ankoraŭ pliperfektigebla, kiu tamen pretendas per sia leksemaro kaj gramatika regularo ekspliki nacian lingvon, estas plisimpliga modelo de ĉi tiu lingvo, preteratentanta esceptojn. Pliperfektigita teorio estas malpli simpliga lingvomodelo, preteratentanta malpli da esceptoj. La progresado de la lingvistika teorio estas sinsekvo de lingvomodeloj, kiu alproksimiĝas al la eksplike priskribenda nacia lingvo tiusence, ke manifestiĝas malpli kaj malpli da esceptoj. Analogio al la modeligado de lingva funkcio estas la matematika elvolvaĵo de analitika funkcio en la maniero de Taylor: la finia sumo de la unuaj *n* adiciatoj konvergas al tiu funkcio tiusence, ke la mezuma diferenco inter ambaŭ fariĝas laŭplaĉe malgranda se *n* fariĝas sufiĉe granda, alivorte: se la modeligado de la funkcio estas sufiĉe progresinta.
Kvankam la sumo de la unuaj *n* adiciatoj de Taylora serio estas racia (eĉ entjera) funkcio, ĝi povas konverĝi al ne racia funkcio, de kiu ĉiu tia sumo laŭkvalite ja same diferencas, sed laŭkvante malpli kaj malpli.

Analoge ĉiu racia lingvomodelo de (ne racia sed:) historie evoluinta lingvo estas esence diferenca de ĉi tiu, sed povas praktike ĝin anstataŭi de pli

empirisch Beobachtbare zu erklären sucht. Die Existenz der manifesten Wortung geht dem theoretisch unterstellten Wesen der ethnischen Sprache voraus. Eine theoretische Behauptung, welche mit einer manifest gewordenen Wortung nicht im Einklang steht, ist fehlerhaft. Zusätzlich verwirklichte Wortungen können daher zur einer Verbesserung der Theorie zwingen.

VII. Eine noch verbesserbare Theorie, die dennoch vorgibt, durch ihren Lexemvorrat und ihr grammatisches Regelwerk eine Nationalsprache zu erklären, ist ein vereinfachendes Modell dieser Sprache, welches Ausnahmen außer Acht lässt. Eine verbesserte Theorie ist ein weniger vereinfachendes Sprachmodell, das weniger Ausnahmen unbeachtet lässt. Der Fortschritt der linguistischen Theorie ist eine Folge von Sprachmodellen, welche sich an die erklärend zu beschreibende Nationalsprache insofern annähern, als immer weniger Ausnahmen auftreten. Eine Analogie zur Modellierung der *sprachlichen* Funktion ist die mathematische Entwicklung einer *analytischen* Funktion nach der Methode von Taylor: die endliche Summe der ersten *n* Summanden konvergiert zu jener Funktion insofern, als die mittlere Differenz zwischen beiden beliebig klein wird, wenn *n* genügend groß wird, m.a.W.: wenn die Modellierung der Funktion genügend fortgeschritten ist. Obgleich die Summe der ersten *n* Summanden der Taylor-Reihe eine rationale (sogar eine ganze) Funktion ist, kann sie zu einer nicht rationalen Funktion konvergieren, zu der zwar jede dieser Teilsummen zwar qualitativ denselben Unterschied aufweist, quantitativ aber einen immer kleineren. Entsprechend ist jedes rationale Sprachmodell einer (nicht rationalen sondern:) geschichtlich entwickelten Sprache von dieser wesensverschieden, kann sie aber in der Praxis umso befriedigender ver-

kontentige, ju pli progresinta estas la modeligado.

VIII. Se oni uzas lingvomodelon ne kiel plisimpligan priskribon de nacia lingvo sed kiel lingvan preskribon, tiam la lingvomodelo fariĝas planlingvo. Lingvonormigo (pli aŭ malpli rigora) estas la postulo, uzi anstataŭ la tiel normigata lingvo lingvomodelon (pli aŭ malpli simplan) de ĝi.

IX. La aksiomoj de funkcianta planlingvo, ekzemple de ILo, reprezentas la dimensiojn, en kiuj okazu la elvolvo de la modeligenda nacia lingvo per ties kompara priskribo.

Se la ekzemplige konsiderata lingvaĵo ne (kontentige) konformas al aksiomo, kaj se ekzistas pli ol unu alternativo al ĉi tiu, ne sufiĉas ĝin anstataŭi per ĝia negacio, sed indas ĝin anstataŭi per pluraj, pli fajne diferencigaj aksiomoj, por ebligi komparon ankaŭ kun aliaj elvolvendaj naciaj lingvoj.

X. Elvolvendaj en modelvicojn estas (kontraste al la aksiomoj de ILo) la eŭropiaj lingvoj, t.e. la oficialaj lingvoj de la nunaj kaj antaŭvidataj membroŝtatoj de la Eŭropa Unio, por ebligi sufiĉan alkutimiĝon al ĉi tiuj lingvoj por mildigi la sentimenton de ilia fremdeco. Tia alkutimiĝo eblas dum ne tro mallonga lerntempo (a) pro transfero el ILo, kiu estas lerninda antaŭe pro sia propedeŭtika valoro kadre de la Lingvo-Orientiga Instruado (vd. Frank/ Lobin, 1998) aŭ kiel esperata komuna dua lingvo de Eŭropio kaj (b) per kontentiĝo kun la sufiĉe simplaj

treten, je weiter die Modellierung fortgeschritten ist.

VIII. Verwendet man ein Sprachmodell nicht als vereinfachende Beschreibung einer Nationalsprache sondern als sprachliche Vorschrift, wird das Sprachmodell zur Plansprache. Sprachnormierung (mehr oder weniger rigoros) besteht in der Forderung, statt der Sprache, die der Normierung unterzogen wird, ein (mehr oder weniger vereinfachendes) Sprachmodell von ihr zu verwenden.

IX. Die Axiome einer funktionierenden Plansprache, z.B. von ILo, vertreten die Dimensionen in welchen die Modellreihen-Entwicklung der zu modellierenden Nationalsprache durch deren vergleichende Beschreibung erfolgen soll. Wenn eine als Beispiel betrachtete nationalsprachige Wortung einem Axiom der als Referenzsprache gewählten Plansprache nicht (befriedigend) genügt, und wenn es zu diesem Axiom mehr als eine Alternative gibt, genügt es nicht, es durch seine Negation zu ersetzen, vielmehr ist es angemessen, es durch mehrere, feiner unterscheidende Axiome zu ersetzen, um den Vergleich mit anderen zu entwickelnden Nationalsprachen zu ermöglichen.

X. In Modellfolgen zu entwickeln sind (kontrastiv zu den Axiomen von ILo) die europischen Sprachen, d.h. die offiziellen Sprachen der heutigen und voraussichtlich hinzukommenden Mitgliedsstaaten der Europäischen Union. Bezweckt wird damit die Ermöglichung einer ausreichenden Gewöhnung an diese Sprachen, um das Gefühl ihrer Fremdheit zu mildern. Eine solche Gewöhnung ist in nicht zu langer Lernzeit möglich, und zwar (a) wegen des Transfers aus ILo, das zuvor wegen seines propädeutischen Werts im Rahmen des Sprachorientierungsunterrichts (vgl. Frank / Lobin, 1998) oder als erhoffte gemeinsame Zweitsprache Europiens lernenswert ist, und (b) wegen der Be-

komencoj de la elvolvaĵoj.

4. *Agadoj kadre de la Sibiua Programo.*

La unuan klopodon, ekplenumi la Sibiuan Programon, prezentis Erzse Kinga (2001) en la revuo GrKG/ Humankybernetik. La laboraĵo komencas per konciza kaj brile klara prezentado de la celo kaj aliĝmaniero de tiu programo. Ni jen ĝin resumas.

Mit seiner darin veröffentlichten kybernetischen Motivationstheorie übertrug Stachowiak erstmals die Konzeption der Lernmatrizen von Karl Steinbuch aus dem Bereich der Wahrnehmungsmodellierung auf die Modellierung der Motivation. Mit der Struktur des dazu von ihm eingeführten „Motivators" ergänzte Herbert Stachowiak das Psychostrukturmodell der Informationspsychologie. Dies trug er erstmals schon im März 1964 beim *„2.Nürtinger Symposion über Lehrmaschinen und Programmierte Instruktion"* der damals von ihm mitgegründeten GPI (*Gesellschaft für Programmierte Instruktion – heute: ...für Pädagogik und Information*) vor. Mehrere Jahre wirkte er an der Arbeit dieser Gesellschaft mit, vor allem als Leiter ihres Arbeitskreises Philosophie und als Mitherausgeber des von ihr entwickelten *„Lexikons der Kybernetischen Pädagogik und der Programmierten Instruktion"* (1966 – Nachdruck 1993), das eine drei Jahrzehnte später in Moskau erschienene pädagogikgeschichtliche Dissertation zum Meilenstein erklärte, der den Zeitpunkt markiert, zu dem *„die Fortschrittsgeschwindigkeit der kybernetischen Pädagogik ihren Höhepunkt erreichte"* (so Komarova in GrKG/H 35/3, 1994, S. 128). Dem 4. Lehrmaschinensymposion legte Stachowiak 1966 eine Ausarbeitung *„Zum Problem einer logisch-semantischen Maßbestimmung des Lernerfolgs"* vor. Sie erschien im selben Jahr als Beiheft zu Band 7 unserer Zeitschrift und bewirkte 1973 die Berufung von Herbert Stachowiak nach Paderborn für das Gebiet „Logisch-semantische Lehrstoffanalysen", für welches das ab 1971 aufgebaute Landesforschungszentrum FEoLL sein viertes Institut einrichtete und Stachowiak zum Direktor bestellte.

Das Institut war mit dem Lehrstuhl für „Wissenschafts- und Planungstheorie" der 1972 im Zusammenhang mit dem FEoLL gegründeten Paderborner Universität verbunden, zu der Stachowiak 1978 hauptamtlich überwechselte. Nach seiner 1986 erfolgten Emeritierung kehrte er nach Berlin zurück.

Unter Stachowiaks Veröffentlichungen ragen die Buchpublikationen *„Rationalismus am Ursprung. Die Genesis des axiomatischen Denkens"* (1971), *„Allgemeine Modelltheorie"* (1973) *„Systematischer Neopragmatismus"* (1980) und das von ihm herausgegebene 5-bändige *Handbuch der Pragmatik* hervor. Zu unserer Zeitschrift, deren Mitherausgeber er 1973 wurde, trug er mehrfach auch eigene Arbeiten bei. Insbesondere griff er 1985/86 mehrfach in die hier von Richard Schulz ausgelöste Diskussion über eine Axiomatisierung der Interlinguistik ein. Allerdings lernte er selbst keine Plansprache mehr - er blieb, trotz der internationalen Beachtung, die er fand, als Autor stets der deutschen Sprache treu. Daher war er auch nach seiner Emeritierung nicht mehr für eine Mitwirkung am Aufbau der AIS zu gewinnen.

Mit den anderen Bemühungen des seit der FEoLL-Gründung in Paderborn arbeitenden Instituts für Kybernetik, dessen Gründung er in Berlin als regelmäßiger (auch aktiver) Teilnehmer der Institutssymposien („Kybernetischen Teestunden") miterlebt hatte, insbesondere mit unserer Zeitschrift, blieb Herbert Stachowiak auch von Berlin aus verbunden. 1999 wurde er erster Träger des *Preises für Gesellschafts- und Organisationskybernetik, Philosophie und Geschichte der Kybernetik*, der seither kurz „Stachowiak-Preis" heißt.

Stachowiaks Gedanken werden nicht zuletzt in der weiteren Entwicklung der Kommunikationskybernetik, speziell auch der kybernetischen Pädagogik und Informationspsychologie, fortwirken. Physisch übernimmt seinen Nachlass die Stiftung Preußischer Kulturbesitz.

Helmar Frank

Wiener-Schmidt-Preisträger Friedhart Klix verstorben.

Am 22.September 2004 verstarb der Psychokybernetiker em.Prof. Dr.habil. Dr.h.c. mult Friedhart Klix – kurz vor Vollendung seines 77. Lebensjahrs. Er war Direktor des psychologischen Instituts der Humboldt-Universität, Herausgeber der *Zeitschrift für Psychologie*, und Mitglied mehrerer nationaler Akademien. 2002 wurde er vierter Träger des Wiener-Schmidt-Preises. *hfr*

Offizielle Mitteilungen der / *Oficialaj Sciigoj de la*

Gesellschaft für sprachgrenzübergreifende europäische Verständigung (Europaklub) e.V.

Societo pri lingvolim-transpaŝa eŭropa interkompreniĝo (EuropaKlub) r.a.

Präsidium / *Prezidio*

Prezidanto: Oliver M. Kellogg; Am Weißen Kreuz 6a, D -89278 Nersingen <oliver.kellogg@t-online.de>

Pluaj estraranoj: OProf.Dr.habil. Eva Poláková, Komárno (SK) & Dipl.-Ing. Peter Bartos, Halle/Saale (D) (deĵorantaj vicprezidantoj), ADoc. Dr. Eugen Macko, München (D), ASci Dr. Zoltan Sebök MUDr., Komárno (SK), Manfred Retzlaff (*trezoristo*).

Konten ĉe Postbank Hannover, (BLZ 250 100 30): Europa-Klub 615.519.302 aŭ „pere de AIS Deutschland" Konto 2051-305" por EuropaKlub"

Redakcia respondeco: Oliver Kellogg. Finredaktita: 2004-09-30

Eŭropa Klubo ricevas sidejon en Komárno (SK).

Dum SUS 27 AIS ofertis en sia *Akademidomo Tyblewski* al la Eŭropa Klubo sidejon en Komárno. Iniciatgrupo verkis la sekvan statuton por slovaka-hungara branĉo kun la precipa celo, plenumi la artikolon IV de la *Deklaracio de Kiel.* Oni invitis por la 1-a de oktobro al oficiala fondo-kunsido. Gvidos la novan societon magistrino Varjú Katalin kiel prezidantino, magistrino Svetlana Genejchanova kiel deĵoranta vicprezidantino kaj bibliotekistino Eva Lendvanyová kiel trezoristino.

Statuto de la Universitatsubtena Societo Kelemantia (USK) - Slovaka-Hungara Branĉo de la *Societo pri Lingvo-Limtranspaŝa Eŭropa Interkompreniĝo (Eŭropa Klubo)*

Artikolo 1: *Nomo, sidejo, enregistrigo*

1.1 Realigante interkonsenton trovitan la 25an de septembro 2004 en Komarno la subskribintoj hodiaŭ decidis per unuanima aprobo de ĉi tiu statuto fondi la Universitatsubtenan Societon Kelemantia (sekve mallongige nomita USK) kiel la slovaka-hungara branĉo de la *Societo pri Lingvo-Limtranspaŝa Eŭropa Interkompreniĝo* (mallonge: Eŭropa Klubo), fondita 1974-11-15 en Paderborn (D) kaj tie registrita. Ili kunvenos morgaŭ, la 1-an de oktobro, kune kun pluaj samcelanoj al ĝenerala fondo-asembleo por elekti la fondo-estraron por la kalendaraj jaroj 2004/05 kaj decidi pri la agadprogramo por tiu tempo.

1.2 USK havas sian siedejon en Komarno, Eŭropa Placo, Župna 1, akademidomo Tyblewski.

1.3 USK estu registrita kiel jure ekzistanta asocio en la registro de asocioj ekzistantaj laŭ slovakaj leĝoj. USK povas enregistriĝi ankaŭ en Komarom (H) konforme la hungaraj leĝoj.

1.4 USK estas kolektiva membro de Eŭropa Klubo. Tio ne malhelpas, ke membroj de USK laŭ propra iniciato estas aŭ fariĝos ankaŭ senperaj membroj de Eŭropa Klubo.

1.5 USK estas komunutila, ne profitorientita societo. Neniu membro, elektita estrarano aŭ elektita revizoro en ĉi tiu kvalito ricevas salajron, honorarion aŭ aliajn pagojn. Por la plenumado de siaj laboroj USK povas uzi laŭ kontrakto (difinanta la taskojn kaj la salajron aŭ honorarion) *kaj* membrojn de USK (inkluzive estraranojn) *kaj* kvalifikitajn eksterulojn.

Artikolo 2: *Labora kaj kromaj oficialaj lingvoj*

2.1 La laborlingvo de USK estas la precipa laborlingvo ankaŭ de la *Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino*, nome la *Internacia Lingvo (ILo) de Doktoro Esperanto,* ĝis kiam eventuale la Eŭropa Parlamento deklaros alian neŭtralan lingvon esti la komuna dua lingvo de la Eŭropa Unio (EU).

2.2 Laŭbezone USK uzos kiel siajn kromajn oficialajn lingvojn la Slovakan aŭ la Hungaran (estante la loke oficialaj lingvoj) aŭ la Germanan (estante la lingvo kun la plej ampleksa parolantaro en Eŭropio t.e. la teritorio de la membro-ŝtatoj de EU inkluzive ties atendo-landojn).

2.3 Ĉi tiu statuto estas verkita kaj subskribita en ILo. Ĝi estu tradukata en la tri aliajn oficialajn lingvojn de USK kaj kvarlingve prezentita cele enregistrigon de USK.

2.4 La asembleoj de la ordaj membroj de USK okazas en ILo sen tradukoj en alia oficala lingvo. En la asembleo de la subtenaj membroj laŭbezone estas uzataj ankaŭ aliaj oficialaj lingvoj, sed kun traduko en ILo.

2.5 La decidprotokoloj de la decidrajtaj organoj de USK estu vortigataj almenaŭ en ILo, laŭeble dulingve, inkluzivante unu el la tri kromaj oficialaj lingvoj de USK.

Artikolo 3: *Celoj*

3.1 USK reprezentas kaj apogas en la Respublikoj Slovaka kaj Hungara la Eŭropan Klubon, precipe koncerne ties strebadon, kunlabore kun AIS fondi, oficialigi, ekfunkciigi kaj progresigi la *Liberan Eŭropian*, la entrepreno Akademidomaro kaj la slovaka AIS-societo SAIS, USK havigas administran *Universitaton Kelemantia de AIS* (mallonge: LEUKAIS).

3.2 USK speziale realigas (1) lingvajn preparkursojn por studentoj kaj docentoj de LEUKAIS en la lingvoj ILo, Hungara, Slovaka kaj Germana, (2) docentigajn kursojn pri la historio, stukturo kaj identeco de AIS. La LEUKAIS-fakultaton 2 USK krome apogas en la evoluigado kaj efektivigo de la nova studadfako „Eŭrologio" (aŭ „Eŭropiko").

3.3 Laŭbezone kompletigante la apogon, kiun havigas al LEUKAIS ties portanta asocio *S-COM Academia Kelemantia*, la entrepreno Akademidomaro kaj la slovaka AIS-societo SAIS, mastrumadan helpon en la realigado de lokaj studadsesioj kaj malcentraj kursoj, precipe per la starigo de akademia libroservo, per enretigado de dulingvaj aŭ pure ILaj kursoj, per tradukado kaj redakciado de kursmaterialoj kaj disertacioj, per tipografia laboro pretiganta formularojn, legitimilojn,

atestojn kaj dokumentojn, per prizorgado de loĝebloj en kaj turismaj vizitoj de la urbo-duopo Komarno-Komarom kaj ĝia ĉirkaŭaĵo kaj per aliaj servoj ebligantaj aŭ plifaciligantaj la studadon ĉe LEUKAIS kaj la partoprenon en ties lokaj konferencoj kaj studadsesioj. S-COM Kelemantia disponigas al USK en la akademidomo Tyblewski ejon por efektivigi sian aktivecon. USK prizorgas memstare ĉi tiun ejon, al kiu ĝi donas la nomon „Salono Schick" memore al la mortinta iama prezidanto de Eŭropa Klubo kaj Senatano de AIS OProf. Karl Schick.

3.4 Unuavice regione, sed laŭeble ankaŭ en la tuta teritorio de la Respublikoj Slovaka kaj Hungara, USK instigas kaj apogas klopodojn, per uzado de ILo apud la loke aŭ najbare oficialaj lingvoj - kaj eventuale apud ankaŭ la Germana kiel la centra kaj relative plejmulta lingvo de Eŭropio – imitmodele kontribui al la eŭropia interkomprenigo kaj al la evoluo de eŭropia identeco.

3.5 USK kunlaboras (sen restrikto al la teritorioj slovaka kaj hungara) kun Eŭropa Klubo por atingi ties celojn vortigitajn en la Deklaracio de Kiel, kies teksto apartenas en ĝia originala vortumo apendice al ĉi tiu statuto.

Artikolo 4: *Membroj*

4.1 USK havas ordajn, subtenajn kaj honorajn membrojn. Eblas aparteni al USK laŭ pli ol unu de ĉi tiuj tri apartenecformoj.

4.2 Ĉiuj fondomembroj estas ordaj membroj. Povas aliĝi kiel orda membro krome ĉiu slovaka aŭ hungara civitano, ĉiu alia, kiu havas daŭran loĝrajton en la Slovaka aŭ Hungara Respubliko, kaj ankaŭ ĉiu civitano de alia lando (eĉ ne apartenanta al la Eŭropa Unio) kun komunikadkapablo en la slovaka aŭ hungara lingvo, se li plenumas almenaŭ unu de la jenaj kvar kondiĉoj:

(a) Li apartenas al sektoro de AIS.
(b) Li havas aŭ havis studentan legitimilon de AIS aŭ enskribiĝis por studado ĉe LEUKAIS.
(c) Li finis ajnan universitatecan aŭ fakaltlernejan studon post la maturecekzameno kaj posedas bazajn konojn de ILo.
(d) Li estas lernejano en plej frue la 10a lerneja jaro kaj posedas tre bonan komunikadkapablon en ILo.

4.3 Subtena membro estas
(a) ĉiu membro de Eŭropa Klubo havanta slovakan aŭ hungaran ŝtatanecon aŭ daŭran loĝrajton en almenaŭ unu de ĉi tiuj respublikoj, se li ne rifuzas la membrecon,
(b) ĉiu civitano de lando de la Eŭropa Unio inkluzive la atendlandojn, kiu aliĝas kiel subtena membro pagante sian subtenan kotizon por almenaŭ la unuaj kvar jaroj de sia membreco, kaj
(c) ajna jure ekzistanta entrepreno, societo aŭ alia personpluropo; ĝin reprezentas vid-al-vide USK, precipe en la asembleo de la subtenaj membroj, nomumita reprezentanto.

4.4 Honoraj membroj estas
(a) aŭtomate la dumvivaj (t.e. sian kotizon unufoje por ĉiam antaŭpagintaj) ordaj aŭ subtenaj membroj de USK kaj
(b) personoj kun ajna ŝtataneco, kiujn la estraro de USK pro reliefigendaj meritoj por la societo aŭ senpere por ties celoj nomumis dumvivaj honoraj membroj.

Artikolo 5: *Organoj de la societo.*

5.1 La organoj de USK estas (a) la asembleo de la ordaj membroj, (b) la asembleo de la subtenaj membroj, (c) la estraro kaj (d) la revizoraro. Ĉiu honora membro rajtas ĉeesti ajnan oficialan kunsidon de USK-organo kaj esprimi siajn opiniojn, sed ne havas en sia kvalito de honora membro voĉdonrajton.

5.2 La asembleo de la ordaj membroj elektas 2, 4 aŭ 6 ordajn, subtenajn aŭ honorajn membrojn por 2 kalendaraj jaroj en la estraron, decidas pri la alteco de la membrokotizo, pri la spezo-kalkulo, la bilanco kaj la buĝeto, pri eventuala eksigo de orda membro kaj pri eventualaj statutŝanĝoj.

5.3 La asembleo de la subtenaj membroj elektas unu subtenan, ordan aŭ honoran membron en la estraron, decidas pri la uzado de la subtenaj kotizoj, pri la spezo-kalkulo kaj la bilanco, pri eventuala eksigo de subtena membro kaj pri eventualaj statutŝanĝoj. Ĝi esprimas sian aprobon aŭ klarigitan malaprobon de la buĝeto.

5.4 La estraro elektas por sia deĵortempo inter siaj 3, 5 aŭ 7 membroj la prezidanton kaj la trezoriston; la aliaj 1, 3 aŭ 5 estraranoj apogas labordisdivide la prezidanton, havante la funkcititolon „vicprezidanto". Reelektiĝo kiel estrarano, prezidanto aŭ trezoristo senrestrikte eblas.

5.5 La asembleoj de la ordaj kaj de la subtenaj membroj elektas po unu revizoro por 2 kalendaraj jaroj. Rea elekto senrestrikte eblas. La du revizoroj kontrolas la libro-tenadon, spezo-kalkulon kaj bilancon kaj eventuale proponas al la asembleoj de la ordaj resp. subtenaj membroj la senŝarĝigon de la estraro.

5.6 Por senŝarĝigo de la estraro necesas kaj sufiĉas, ke en ambaŭ asembleoj pli da membroj voĉdonas jese ol nee. Por statutŝanĝo necesas kaj sufiĉas, ke en ambaŭ asembleoj almenaŭ 2/3 de la voĉoj ĝin aprobas.

Artikolo 6: *Kotizoj kaj mastrumado*

6.1 La spezo-kalkulo, bilanco kaj buĝeto okazas en Eŭroj. Laŭbezone okazas transkalkulo en Slovakajn Kronojn aŭ en Hungarajn Forintojn.

6.2 Se la asembleo de la ordaj membroj ne decidas alian kotizaltecon por la sekva jaro ĝi estas 6,5 Eŭroj kalendarjare por ĉiu orda membro.

6.3 La kotizo de subtena membro estas la 5-oblo de la kotizo de orda membro, se la subtena membro ne mem ofertas la regulan pagadon de pli alta jarkotizo.

6.4 Honoraj membroj ne pagas en tiu ĉi kvalito kotizon.

6.5 Per antaŭpago de 25 jarkotizoj orda aŭ subtena membro akiras la dumvivan membrecon. Por akiri la dumvivan membrecon en aĝo pli alta ol 60 jaroj sufiĉas antaŭpagi po unu jarkotizon malpli por ĉiu vivjaro pli alta ol 60, sed minimume 10 jarkotizojn. Lernejanoj, studentoj, senlaboruloj kaj pensiuloj povas antaŭpagi la dumvivan kotizon en 4 tranĉoj: 40%n tuj, po 20%n en la sekvantaj 3 jaroj.

Artikolo 7: *Ekfunkciigaj preskriboj. Malfondo.*

7.1 La fondo-estraro kaj la unuaj revizoroj elektiĝas por la kalendaraj jaroj 2004 kaj 2005.

7.2 USK malfondiĝas aŭtomate, se la nombro de ordaj membroj fariĝas malpli ol 3 aŭ se la nombro de la ordaj kaj subtenaj membroj kune malsuperas 7. Alikaze necesas minimume 3/4 de la voĉoj kaj en la asembleo de la ordaj membroj kaj en la asembleo de la subtenaj membroj por malfondi la societon.

7.3 En la kazo de malfondo la kapitalo kaj havaĵoj de USK transiru al Eŭropa Klubo, laŭeble kun la celo de plua apogo de LEUKAIS.

Komarno, 2004-09-30 La iniciatgrupo.

Offizielle Bekanntmachung

Oficialaj Sciigoj de AIS

Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

Fondita en la Respubliko de San Marino
Prezidanta Skretariejo: Kleinenberger Weg 16 B, D-33100 Paderborn,
tel.: (0049-/0-)5251-64200, fakso: (0049-/0-)5251-163533, reto: vera.barandovska@zitmail.upb.de
Konto: 2051-305 Postbank Hannover (BLZ: 350 100 30)
Redakcia respondeco: OProf. Dr.habil.R.Fössmeier Finredaktita: 2004-09-30

Protokolo de la 53a senatkunsido (la 47a post la oficialigo de AIS fare de la Konsilio de la XII, la 55a post la fakta eklaboro) okazinta en Komárno dum SUS 27. Kunsidtempoj:
- Sabato, 2004-08-28, 10: 15–11:00
- ĵaŭdo, 2004-09-02, 20:00–21:00
- Sabato, 2004-09-04, 13:00–13:30

1. Formalaĵoj.

Ĉeestas senatanoj Fössmeier, Frank kaj Quednau, krome OProf. Eva Poláková kaj OProf. Helmut Angstl kiel vicsenatanoj. La Senato estas kvoruma kaj decidas la tagordon evidentiĝantan el tiu ĉi protokolo. La protokolon skribu sekretario Fössmeier.

Ek de la dua kunsido vicsenatano OProf. Pennacchietti transprenas la voĉon de Angstl.

2, Raporto pri la preparoj de SUS 27 kaj la inaŭguro de LEUKAIS

La senato unuanime decidas, ke la salonoj en la nova akademidomaro en Komárno, strato Župná/Megye 1, estu inaŭguritaj je jenaj nomoj:

Sekcio 1:	Hermann Schmidt
Sekcio 2:	Jan Amos Komenský
Sekcio 3:	Ευκλειδης (Eŭklido) – M. Fréchet – G. Peano
Sekcio 4:	René Descartes
Sekcio 5:	Galileo Galilei
Sekcio 6:	Αριστοτελης (Aristotelo) – Gandhi
Arta Sektoro:	Hermann Hesse
Scienc-aplika Sektoro:	J. Watt – E. Wüster – K. Zuse
LEUKAIS, fak. 2:	Ivo Lapenna
LEUKAIS, fak. 3:	Лейзер Заменгофъ (Lejzer/Lazaro Zamenhof)

Egale uzeblas formoj latin-literigitaj aŭ esperantigitaj laŭ PIV.

3. Ekzamenofico

Dum SUS 27 la ekzamenofico havu jenajn nekonstantajn membrojn (parenteze la konstantaj membroj):

Direktoro: (OProf. Quednau); Vicdirektoro: (OProf. Poláková)		
Sekcio 1:	OProf. Frank	(OProf. Fössmeier)
Sekcio 2:	PDoc. Barandovská-Frank	(OProf. Korĵnevskaja)
Sekcio 3:	– estas nek kandidatoj nek docentoj –	(OProf. Minnaja)
Sekcio 4:	ADoc. Macko	(OProf. Angstl)
Sekcio 5:	EProf. Lewanderska-Quednau	(OProf. Maitzen)
Sekcio 6:	EProf. Leonov	(OProf. Lobin)

4. Procesoj

a) Eksa Senata Sekretario: La postulitaj dokumento ankoraŭ ne estis transdonitaj al la ekzamenofico; ankaŭ la presilo apartenanta al AIS ne estis transdonita. Prezidanto Frank do komisios notarion Rost ekigi proceson kontraŭ la eksa senata sekretario Joanna Lewoc. Reprezentanto flanke de AIS estos OProf. Lobin.

b) ASci Piotrowski: Kiel decidite dum la antaŭa senatkunsido, prezidanto Frank komisios notarion Rost ekprocesi. AIS-on reprezentos la trezoristo, OProf. Wickström.

5. Proponoj al la Ĝenerala Asembleo

a) Ĉar la komisionoj pri regular-aktualigo, starigitaj dum SUS 26, montriĝis tro grandaj por efika diskuto, la ĜA starigu malpli grandajn, al kiuj apartenu la sekvaj AIS-anoj kaj ĉu, kiu dum la ĜA anoncas sian intereson:

Ekzamenregularo, instruadregularo: Quednau, Poláková, Fössmeier, Frank, Lobin.

Honorregularo: Frank, Fössmeier, Maitzen.

Kotizregularo: Wickström, Lobin, Poláková.

Alvokoregularo, kunsidregularo: Fössmeier, Quednau.

Nova regularo pri akademia strukturo: Frank.

La unue nomitaj estu la prezidantoj de la komisionoj. La ŝanĝoj de la instruregularo klarigu, ke la studad-daŭroj en alineo 3.4 estas normalaj studad-daŭroj, kiuj ne nepre preskribas la pason de difinita tempo.

b) SUS 28 okazu en la semajno de la 21a ĝis la 28a de aŭgusto 2005, laŭ invito de EProf. Leonov en Karlovo (BG); se tio montriĝos neebla, ĝi okazu samperiode en Komárno (SK).

c) La ĜA aprobu la rezolucion favoran al la internacia lingvo Esperanto, faritan de la konferenco de la kulturministroj el la novaj EU-landoj en aprilo/majo en Lublin (PL).

6. AIS-*libro*

Ĝar la kompleta AIS-libro kun la necesaj tradukoj ne estas preta, provizore aperu nova ISD-libro, kiun publikigu, kiel ofertite, Universitato Justo aŭ Moskva Ŝtata Industria Universitato (MGIU).

7. *TTT-ejo de AIS*

Ek de 2005 AIS havu privatan TTT-ejon, por kiu estu enbuĝetigitaj jare 200 euroj.

8. *Alvokoj*

La senato unuanime alvokas ADoc. Konnerth kiel EProf. respondecan pri la fakultat-departemento en Sibiu-Hermannstadt, en kiu AIS enkorpiĝas.

9. Acta *Sanmarinensia*

La senato proponas al la scienc-ofico, ke ankoraŭ en 2004 aperu nova volumo de Acta Sanmarinensia, kiun eldonu LEUKAIS.

Komárno, 2004-09-04
H. Frank, prezidanto
R. Fössmeier, protokolofico

Protokolo de la Asembleo de la Subtena Sektoro, okazinta en Komárno dum SUS 27 dimanĉon, 2004-08-29, 16:15 – 16:45 h, en salono Eŭkleides-Peano-Fréchet de la Akademidomo Pancer.

TOP 1. *Formalaĵoj*

Bontempa invito okazis per la SUS-programo. Gvidos la prezidanto. Laborlingvo estu nur ILo.

TOP 2: *Raportoj. AKU-valoro. Senŝarĝigoj.*

La prezidanto klarigis, ke ĉiuj akademidomoj (Neergaard, Pancer, Popovic, Szerdahelyi, Tyblewski kaj Schulz) povis esti aĉetataj per kredito de dumviva subtena membro kaj renovigitaj per subvencio de AIS, kiu havos 25jaran uzadrajton. Pro foresto de trezoristo kaj revizoro la asembleo unuanime decidis, ke la AKU-valoro ankaŭ en 2005 restu senŝanĝita (65 eŭroj), kaj delegis la aprobon de spezkalkulo, bilanco kaj buĝeto same kiel la senŝarĝigon al la 32a Ĝenerala Asembleo.

TOP 3: *Decidoj pri proponoj*

Same kiel la Arta Sektoro ricevis en la akademidomo Schulz la Salonon Hesse kaj la Sciencaplika (Teknika) Sektoro en la akademidomo Szerdahelyi la Salonon Watt-Wüster-Zuse ankaŭ SubS deziras ricevi propran salonon en unu el la akademidomoj. S-COM Kelemantia, SAIS kaj Aka-demidomaro GmbH povos kunuzi la salonon. Escepte vivanto povus fariĝi ĝia nomdonanto, prefere la mondononto aŭ monhavigonto por la senpere apude planita 5-etaĝa akademidomo.

TOP 4: *Aliaĵoj.*

Nenio kroma estis pritraktita.

Komárno, 2004-09-29. Protokolis: H.Frank

Protokolo de la 32a Ĝenerala Asembleo de AIS okazinta en Komárno dum SUS 27 je dimanĉo, 2004-09-05, 10:00 – 12:30.

1. *Formalaĵoj.*

Ĉeestas naŭ efektivaj membroj kaj komence ses pliaj ISKanoj, kiuj havas ĉeestrajton. Ĉar estis laŭ regulare invitite al la ĜA, neniu pridubas la kvorumecon. Protokolas laŭ unuanima decido la direktoro de la protokolofico, OProf. Fössmeier.

La tagordo el la invito estas unuanime akceptita. Ne alvenis proponoj antaŭ la asembleo. La Senato proponas trakti jenajn temojn:

- Tempo kaj loko de SUS 28
- Subteno de la rezolucio de Lublin de la nov-EU-landaj rektoroj
- Eldono de ISD-libro
- Aktualigo de la regularoj

OProf. Frank proponas, ke la sukcesa plenumo de interlingvistika studo ĉe Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań (PL) estu ĉe AIS adapte adoptebla kiel bakalaŭreco.

2. *Ĝenerala raporto de la Senato*

Ĉar la ĜA en Berlino en februaro konstatis la kondiĉojn plenumitaj, SUS 27 povis okazi en Komárno. Komence de SUS 27 estis inaŭguritaj la akademidomaro de LEUKAIS, en kiu okazis la sesio. Por tio la domaro estis renovigita per investo de AIS.

Sub la gvido de AProf. Stępniewski reaktiviĝis la Pola AIS-filio.

Ankoraŭ ne eblis ĝisfine ellabori la aktualigon de la regularoj.

La senato komisiis la prezidanton, zorgi pri tribunala decido pri la diferencoj kun Siegfried Piotrowski hon. prof. kaj Mag. Joanna Lewoc.

3. *Financa raporto*

Por la financofico vicdirektoro OProf. Poláková prezentas bilancon kaj spezkalkulon por 2003 kun la postulita divido inter la Scienca kaj la Subtena Sektoroj. Ankoraŭ mankas revizora raporto.

Ĉar la ĜA ne vidas enhavajn problemojn en bilanco kaj spezkalkulo, ĝi unuanime delegas sian rajton pri senŝarĝigo al unuanima decido de la revizoraro. Se tia unuanima senŝarĝigo ne okazos, la decidon faros la sekva ĜA.

La ĜA unuanime akceptas la prezentitan buĝeton por 2004. Por 2005 estas planata buĝeto kun la sama amplekso.

La ĜA unuanime decidas, ke kadre de siaj sciencaj aktivadoj AIS proksimume egale subtenu siajn klerigejojn en Sibiu (RO) kaj Komárno (SK).

OProf. Lobin proponas senŝarĝigon de la Senato kun la escepto de la delegita senŝarĝigo de la trezoristo. La ĜA akceptas la proponon kun unu sindeteno.

4. *Proponoj alvenintaj almenaŭ 24 horojn antaŭ la ĜA*

Ne estas.

5. *Proponoj prezentitaj dum tagordero 1*

a) SUS 28 okazu de 2005-08-21 al 2005-08-28 en Karlovo, se partoprenos almenaŭ kvin senatanoj kaj vicsenatanoj. Se tio ne eblos, ĝi okazu en Komárno. Akceptita kun tri sindetenoj.

b) La ĜA aprobu la rezolucion favoran al la internacia lingvo Esperanto, faritan de la konferenco de la rektoroj el la novaj EU-landoj en aprilo/majo en Lublin (PL). Unuanime akceptita.

c) Ĉar la materialo por kompleta plurlingva AIS-libro ne estas preta, estu eldonita nun nur nova ISD-libro por 2004-2005. Unuanime akceptita.

d) Pri la aktualigo de la regularoj laboru komisionoj; iliaj unuanimaj decidoj validu, kaj nur pri eroj ne unuanime apogitaj decidu la sekva ĜA. La komisionoj konsistu el jenaj AIS-anoj (komisionestroj substrekitaj):

Ekzamenregularo, instruadregularo: Quednau, Fössmeier, Frank, Lobin, Poláková.
Honorregularo: Frank, Fössmeier, Maitzen.
Kotizregularo: Wickström, Frank, Lobin, Poláková.
Alvokoregularo: Fössmeier, Frank, Quednau.
Kunsidregularo: Fössmeier, Frank, Minnaja, Quednau.
Nova regularo pri akademia strukturo: Frank, Minnaja, Quednau.
La komisiono pri la instruadregularo difinu ankaŭ regulojn por la internacia maturecekzameno.
Unuanime akceptita.

e) Sukcesa plenumo de trijara interlingvistika studo ĉe Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań estu, kvankam ĝi ne akirigas akademian gradon, ĉe AIS adapte adoptebla kiel bakalaŭreco. Unuanime akceptita.

6. *Elektoj*

La ĜA unuanime decidas, ke la nord-orient-eŭropa AIS-filio estu gvidata de Prof[T] Ŝilo, Borzikov prof. kaj ASci. Tuhvatullina. Same unuanime ĝi petas AProf. Feldman González, AProf. Richmond kaj ADoc. Brewer prof., starigi AIS-strukturon en Norda Ameriko.

7. *Diversaĵoj.*

Nenio decidenda.

Komárno, 2004-09-05
H. Frank, prezidanto
R. Fössmeier, protokolofico

Raportoj el la kunsidoj de la sekcioj de la Scienca Sektoro de AIS dum SUS 27 je 2004-08-31, 20:00 – 21:00.

Sekcio 1 (salono Schmidt).

Post sukcesa adopto de siaj gradoj (kiu intertempe okazis) Dr. Ljubiša Preradović iĝu ADoc. kaj Mag. Viliam Búri ĝu ASci. en sekcio 1.

Se SUS 28 okazos en Karlovo, OProf. Dr. habil. Poláková prezentos kurson pri propedeŭtiko.

Se ADoc. Dr. Vojaček prezentos LEONARDO-projekton, en kiu studentoj lernu ILon por profiti de AIS-kursoj, la instrutekaj kursoj de sekcio 1 estu por tio je dispono.

Sekcio 2 (salono Komenský).

S-roj Davide Astori (univ. Parma) kaj Federico Gobbo (univ. Varese Insubria) estu ASci. en sekcio 2. Ili estu invititaj partopreni en SUS 28.

ASci. Gerrit Bervelling estu invitita kontribui al kurso pri traduk-arto aŭ religiscienco dum SUS 28 kaj per tio prepariĝi al ADoc-iĝo.

ADoc. Michel Duc Goninaz estu invitata paroli pri la lasta eldono de PIV kaj ĝenerale pri leksikologio.

Sekcio 3.
Ĉar neniu sekciano partoprenis en SUS 27, ne okazis kunsido.

Sekcio 4 (salono Descartes).
Ne estis decidoj pri alvokoj aŭ rango-altigoj aŭ aliaj decidoj pri la tempo post SUS 27.

Sekcio 5 (salono Galilei).
Steven Brewer prof. dr. estis alvokita kiel ADoc. pri bioekologio.
La estraro de la sekcio estis kompletigita jene:

- Dekano: OProf. Hans Michael Maitzen dr.
- Vicdekano: OProf. Hans Dietrich Quednau dr.
- Fakaro 5.1: Estro AProf. Witold Stępniewski, vicestro ADoc. Eva Bojaĝieva.
- Fakaro 5.2: Estro OProf. Amri Wandel, vicestro OProf. Maitzen
- Fakaro 5.3: Estro OProf. Claŭde Roux, vicestro ADoc. Steve Brewer prof.
- Medicina departemento en 5.3: Estro OProf. Rüdiger Sachs, vicestro EProf. Alicja Lewanderska.

Sekcio 6 (salono Aristotelo/Gandhi).
Ne okazis alvokoj aŭ rango-altigoj. Por SUS 28 la profesoroj Leonov, Kauffmann, Stępniewski kaj Lewanderska-Quednau proponos kursojn respektive pri turisma ekologio, medicino, ekologio kaj naturkuracado.

Resumis R. Fössmeier, senata sekretario.

REGISTRO

de la eksterlandaj kaj polaj apartenantoj al la Internacia Sciencista Kolegio (ISK) de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, kies sube enlistigitaj internaciaj sciencistaj gradoj kaj titoloj surbaze de sukcesa kompletigo de studoj kaj fina ekzameno ĉe la Akademia Internacia de la Sciencoj estas en la latina lingvo agnoskataj en Bjalistoka Teknika Universitato konforme al la interkonsento de 1989-12-01 subskribita kun aprobo de la ministro pri nacia klerigado de 1989-11-17 kaj en la aliaj polaj universitatecaj klerigejoj, kiuj deklaris aliĝon al la sama interkonsento.

REJESTR

Cudzoziemców i obywateli polskich należących do Międzynarodowego Kolegium Naukowego Międzynarodowej Akademii Nauk San Marino, których niżej wymienione stopnie i tytuly naukowe na podstawie ukończonych studiów i egzaminu końcowego złożonego na Międzynarodowej Akademii Nauk, są uznawane w języku łacińskim w Politechnice Białostockiej na podstawie porozumienia o współpracy z dnia 1989-12-01 podpisanego za zgodą Ministra Edukacji Narodowej z dnia 1989-11-17 i na innych polskich uczelniach, które zadeklarowały przystąpienie do tego porozumienia.

Loko de agnosko: **Lublin (PL)**

Viciga numero / dokumenta n-ro		Dato de agnosko	NOMO (enalfabetiga) kaj kromnomoj	Grado de antaŭa studadkompletigo	Akirita en (ĉe AIS)	Donita latina titolo (mallongigo)
1	1704 B 008	2004-09-27	Māra TIMERMANE	studadmatureco	LV	Bac. sc. morph.
2	1704 B 009	2004-09-27	Aurelija MAŠALAITĖ	studadmatureco	LT	Bac. sc. morph.
3	1704 B 010	2004-09-27	Aleksandra Maria NOWOK	studadmatureco	PL	Bac. sc. morph.
4	1704 B 011	2004-09-27	Dawid SZMATUŁA	studadmatureco	PL	Bac. sc. morph.
5	1704 B 012	2004-09-27	Eva ABERSONE	studadmatureco	LV	Bac. sc. morph.
6	1704 B 013	2004-09-27	Elton ZAIMI	studadmatureco	AL	Bac. sc. morph.

Ekzempleron de tiu ĉi listo estos ekde hodiaŭ konservata en la sekretariejo de la Bjalistoka Teknika Universitato.

Od dnia dzisiejszego egzemplarz niniejszego wykazu przechowywany jest w sekretariacie Politechniki Białostockiej.

Lublin, 2004-09-29

(OProf. Dr. habil. Helmar FRANK)
prezidanto de AIS

(OProf. Hans-Dietrich QUEDNAU dr. habil.)
ekzamenofico de AIS

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ · AIS RSM

REGISTRO

de la eksterlandaj kaj slovakiaj apartenantoj al la Internacia Sciencista Kolegio (ISK) de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, kies sube enlistigitaj sciencistaj gradoj kaj titoloj estas en la latina kaj la internacia lingvoj agnoskataj kaj uzeblaj en la Slovakia Respubliko kiel egalvaloraj al la sciencistaj gradoj samŝtupaj donitaj de slovakiaj universitatoj. La sciencistaj gradoj kaj titoloj estas akiritaj surbaze de sukcesaj kompletigo de studoj kaj fina ekzameno (aŭ *honoris causa*) ĉe AIS konforme al la artikoloh 19-20 de la sanmarina kadra leĝo pri universitatnivela klerigado de 1985-10-31, al la dekreto 431/86 de 1986-07-14 de la Dicastero Pubblica Istruzione, Cultura e Giustizia, al la studad- kaj ekzamenregularo de AIS kaj al la artikoloj 2.3 kaj 3.4/7 de la interkonsento (kongrua kun la leĝoj validaj en la Slovakia Respubliko) inter AIS kaj la Pedagogia Altlernejo en Nitra de 1994-02-16.

REGISTER

der ausländischen und slowakischen Angehörigen des Internacia Sciencista Kolegio (ISK) der Internationalen Akademie der Wissenschaften (AIS) San Marino, deren nachfolgende eingetragene akademische Grade und Titel in der Slowakischen Republik in lateinischer und internationaler Form anerkannt und führbar und den von slowakischen Hochschulen erteilten gleichwertig sind. Der Erwerb dieser wissenschaftlichen Grade und Titel erfolgte aufgrund des erfolgreichen Abschlusses von Studien und der Schlussprüfung (oder „honoris causa") bei der AIS gemäß den Artikeln 19-20 des Sanmarinesischen Universitätsrahmengesetzes von 1985-10-31, dem Erlass 431/86 von 1986-07-14 des Dicastero Pubblica Istruzione, Cultura e Giustizia , der Studien- und Prüfungsordnung der AIS und den Artikeln 2.3 und 3.4/7 des (mit den in der Slowakischen Republik geltenden Gesetzen in Einklang stehenden) Abkommens zwischen der AIS und der Pädagogischen Hochschule in Nitra von 1994-02-16.

REGISTER

zahraničných a slovenských príslušníkov medzinárodného vedeckého kolégia (ISK) Medzinarodnej akademie vied (AIS) San Marino, ktorých tu uvedené akademické hodnosti a tituly sú v Slovenskej republike uznávané a uvádzané v latinskej a medzinárodnej forme a sú rovnocenné vedeckým hodnostiam rovnakej úrovne priznávané slovenskými vysokými školami. Získanie týchto vedeckých hodností a titulov je možné na základe úspešného ukončenia štúdia a záverečnej skúšky (príp. „honoris causa") u AIS podľa článku 19-20 zákonov univerzít San Marino 1985-10-31. časť 431/86 zo dňa 1986-05-15 dicastero pubblica istruzione, cultura e giustizia, študijného a skúšobného poriadku AIS a článkov 2.3 a 3.4/7 (ktoré sú v súlade s platnými zákonmi Slovenskej republiky) zmluvy medzi AIS a Vysokou školou pedagogickou v Nitre zo dňa 1994-02-16.

Loko de agnosko: **Komárno (SK)**

Viciga numero / dokumenta n-ro		Dato de agnosko	NOMO (enalfabetiga) kaj kromnomoj	Grado de antaŭa studadkompletigo	Akirita en (ĉe AIS)	Donita latina titolo (mallongigo)
1	1704 B 001	2004-09-03	Jitka SKALICKÁ	UAM Poznań	PL	Bac. sc. hum.
2	1704 B 002	2004-09-04	Karolina TROJNAR	studadmatureco	PL	Bac. sc. morph.
3	1704 B 003	2004-09-04	Aleksandra BOJANOWSKA	studadmatureco	PL	Bac. sc. morph.
4	1704 B 004	2004-09-04	Willfred HARTIG	Vorprüfung in Philosophie und Pädagogik	DE	Bac. sc. phil.
5	1704 B 005	2004-09-04	Agnieszka MATUSZEK	studadmatureco	PL	Bac. sc. morph.
6	1704 B 006	2004-09-04	Kinga Joanna MATUSIAK	studadmatureco	PL	Bac. sc. morph.
7	1704 B 007	2004-09-04	Barbara LIBERSKA	studadmatureco	PL	Bac. sc. morph.
8	1704 M 001	2004-09-03	Viliam BÚR	magister	SK	Mag. sc. cyb.
9	1704 M 002	2004-09-03	Paulina Ewa BARSKA	Bac. sc. morph.	PL/AIS	Mag. sc. morph.
10	1704 M 003	2004-09-03	Joanna DMOWSKA	Bac. sc. morph.	PL/AIS	Mag. sc. morph.
11	1704 M 004	2004-09-03	Tatiana Ewa ZIENTARA	Bac. sc. morph.	PL/AIS	Mag. sc. morph.
12	1704 M 005	2004-09-03	Marzena Maria MURAWSKA	Bac. sc. morph.	PL/AIS	Mag. sc. morph.
13	1704 M 006	2004-09-03	Beata Kamila BRAUER	Bac. sc. morph.	PL/AIS	Mag. sc. morph.
14	1704 M 007	2004-09-03	Joanna SIERACKA	Bac. sc. morph.	PL/AIS	Mag. sc. morph.
15	1704 M 008	2004-09-03	Ewelina HARMACIŃSKA	Bac. sc. morph.	PL/AIS	Mag. sc. morph.
16	1704 M 009	2004-09-03	Sebastian HOFFMANN	Dipl.-Wirtsch.-Ing.	DE	Mag. sc. hum.
17	1704 M 010	2004-09-04	Anna OZIĘBŁOWSKA	Bac. sc. morph.	PL/AIS	Mag. sc. morph.
18	1704 D 001	2004-09-03	Josef VOJÁČEK	Philosophiae Doctor	SK	Dr. sc. cyb.
19	1704 D 002	2004-09-03	Ljubiša PRERADOVIĆ	Dr. Ing.	BA	Dr. sc. cyb.

Ekzempleron de tiu ĉi listo konservos ekde hodiaŭ la Pedagogia Altlernejo en Nitra reprezentante la slovakian instituciaron pri universitatnivela studado.

Ein Exemplar dieser Auflistung vewahrt ab heute die Pädagogische Hochschule in Nitra, die hierbei die Hochschulbildungsinstitutionen der Slowakischen Republik repräsentiert.

Jeden exemplár tohto zoznamu si od dnešného dátumu ponechá Vysoka škola pedagogická v Nitre ako reprezentant vysokoškolných vzdelávacích inštitucií Slovenskej republiky.

Komárno, 2004-09-05

(OProf. Dr. habil. Helmar FRANK)
prezidanto de AIS

(OProf. Dr. habil. Eva POLÁKOVÁ)
ekzamenofico de AIS

Richtlinien für die Kompuskriptabfassung

Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 2001 auch Artikel in allen vier anderen Arbeitssprachen der Internationalen Akademie der Wissenschaften (AIS) San Marino, also in Internacia Lingvo (ILo), Englisch, Französisch und Italienisch. Bevorzugt werden zweisprachige Beiträge – in ILo und einer der genannten Nationalsprachen - von maximal 14 Druckseiten (ca. 42.000 Anschlägen) Länge. Einsprachige Artikel erscheinen in Deutsch, ILo oder Englisch bis zu einem Umfang von 10 Druckseiten (ca. 30.000 Anschlägen). In Ausnahmefällen können bei Bezahlung einer Mehrseitengebühr auch längere (einsprachige oder zweisprachige) Texte veröffentlicht werden.

Das verwendete Schrifttum ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluss des Beitrags zusammenzustellen – verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a“, „b“, usf. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und Erscheinungsjahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenartikel werden - nach dem Titel - vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. – Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem, Zusatz „a“ etc.) zitiert werden. – **Bevorzugt werden Beiträge, die auf früher in dieser Zeitschrift erschienene Beiträge anderer Autoren Bezug nehmen.**

Graphiken (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) und auch Tabellen sind als „Bild 1“ usf. zu nummerieren und nur so im Text zu erwähnen. Formeln sind zu nummerieren.

Den Schluss des Beitrags bilden die Anschrift des Verfassers und ein Knapptext (500 – 1.500 Anschläge einschließlich Titelübersetzung). Dieser ist in mindestens einer der Sprachen Deutsch, Englisch und ILo, die nicht für den Haupttext verwendet wurde, abzufassen.

Die Beiträge werden in unmittelbar rezensierbarer Form sowie auf Diskette erbeten. Artikel, die erst nach erheblicher formaler, sprachlicher oder inhaltlicher Überarbeitung veröffentlichungsreif wären, werden in der Regel ohne Auflistung aller Mängel zurückgewiesen.

Direktivoj por la pretigo de kompuskriptoj

Krom germanlingvaj tekstoj aperos ekde 2001 ankaŭ arikoloj en ĉiuj kvar aliaj laborlingvoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, do en Internacia Lingvo (ILo), la Angla, la Franca kaj la Itala. Estas preferataj dulingvaj kontribuaĵoj – en ILo kaj en unu el la menciitaj naciaj lingvoj – maksimume 14 prespaĝojn (ĉ. 42.000 tajpsignojn) longaj. Unulingvaj artikoloj aperadas en la Germana, en ILo aŭen la Angla en amplekso ĝis 10 prespaĝoj (ĉ. 30.000 tajpsignoj). En esceptaj kazoj eblas publikigi ankaŭ pli longajn tekstojn (unulingvajn aŭ dulingvajn) post pago de ekscespaĝa kotizo.

La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo; en kazo de samjareco aldonu „a“, „b“, ktp. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De monografioj estu – poste – indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo) , la loko kaj la jaro de la apero kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. - En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a“ ktp.). - **Preferataj estas kontribuaĵoj, kiuj referencas al kontribuaĵoj de aliaj aŭtoroj aperintaj pli frue en ĉi tiu revuo.**

Grafikaĵojn (kiuj estas havigendaj laŭeble kiel presoriginaloj) kaj ankaŭ tabelojn bv. numeri per „bildo 1“ ktp. kaj mencii en la teksto nur tiel. Formuloj estas numerendaj.

La finon de la kontribuaĵo konstituas la adreso de la aŭtoro kaj resumo (500 – 1.5000 tajpsignoj inkluzive tradukon de la titolo). Ĉi tiu estas vortigenda en minimume unu el la lingvoj Germana, Angla kaj ILo, kiu ne estas uzata por la ĉefteksto.

La kontribuaĵoj estas petataj en senpere recenzebla formo kaj krome sur diskedo. Se artikolo estus publicinda maljam post ampleksa prilaborado formala, lingva aŭ enhava, ĝi estos normale rifuzata sen surlistigo de ĉiuj mankoj.

Regulations concerning the preparation of compuscripts

In addition to texts in German will appear from 2001 onwards also articles in each four other working languages of the International Academy of Sciences (AIS) San Marino, namely in Internacia Lingvo (ILo), English, French and Italian. Articles in two languages – in ILo and one of the mentioned national languages – with a length of not more than 14 printed pages (about 42.000 type-strokes) will be preferred Monolingual articles appear in German, ILo or English with not more than 10 printed pages (about 30.000 type-strokes). Exceptionally also longer texts (in one or two languages) will be published, if a page charge has been paid.

Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors (abbreviated if necessary) should be indicated. Monographs should be named along with place and year of publication and publisher, if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. – Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). – **Preferred will be texts, which refer to articles of other authors earlier published in this journal.**

Graphics (fit for printing) and also tables should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. and should be referred to as such in the text. Mathematical formulae should be numbered.

The end of the text should form the author's address and a resumee (500 – 1.5000 type-strokes including translation of the title) in at least one of the languages German, ILo and English, which is not used for the main text.

The articles are requested in a form which can immediately be submitted for review, and in digital form, too. If an article would be ready for publication only after much revising work of form, language or content, it will be in normal case refused without listing of all deficiencies.